

*Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503
dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana*

*Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërisht sipas
vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës*

Retpaĝo- Faĝja në internet: [http://Esperantoshqipria.
weebly.com/index.html](http://Esperantoshqipria.weebly.com/index.html) aŭ www.Esperanto.net/al

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet:
albanajesperantistoj@yahoo.com

Adreso de redaksio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016

Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)

Aktivuloj

Prezidanto

Ing. Mg. Shaban Hasani, Tiranë (00355682080677, shabanhasani@gmail.com);

Fakdelegito Domkonstruado

Mg.Gjergji Gusho, Pogradec,(00355673860228 gjergji_gusho@yahoo.com),

Fakdelegito, Lingvoj rusa, itala,

Mg.Agim Peraj, Lezhë, (355694472430, agimperaj@yahoo.it);

Fakdelegito, pentroarto

Mg. Martha Otto, Vlorë, (00355697946646, martha.otto@gmail.com)

Fakdelegito Lingvoj, Bahaa Movado

Dr. Sajmir Beqiraj, Tiranë, (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com);

Fakdelegito Biologio, zoologio

Mg. Nehat Sokoli , Kukës,(++355682587699, nehatsokoli@yahoo.com);

Fakdelegito Instruado, Medicinaj herboj

Dr. Engjell Gusho, Korçë, (00355692350111, engjellgusho@yahoo.com),

Dr. Fakdelegito, Medicino, endokrinologio

Rita Permeti, Tiranë (0035542363 360; 00355686857800 ritapermeti@yahoo.com);

Fakdelegito Tipografio, Filatelio

Luan Jaupi, Durrës, (00355675567184, luanjaupi2014@gmail.com)

Fakdelegito, Fotografio, Numismatiko, Muzeoj

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO

Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos

Nr. 141, decembro- januaro (dhjetor 2018- janar 2019)

Albanaj proverboj

Njeriu duhet të përpiqet të mësojë çdo gjë, jo të tregojë veten e tij.- Homo devas klopodi lerni çion, ne memlaŭdi..

Zgjuarësia është një dritë hyjnore, ndriçimi i së cilës ndrit jo vetëm sipërfaqen e sendeve, por edhe brendinë e tyre. - Saĝeco estas diina lumo, kies brilo heligas ne nur surfacon de objektoj, sed ankaŭ ties internon.

Më i forti i njerëzve është ai që është i zoti të përmbajë vetveten- Plej forta inter homoj estas tiu kapabla sin deteni.

Ajo që qeveris botën nuk është as forca, as ligji, por është mirësjellja dhe edukata.- Tio reganta mondon ne estas forto, nek leĝo sed bonkonduito kaj edukeco.

Bota është një shesh i ekspozuar shiut dhe erës; ai që në këtë shesh e ruan dritën e përpjekjes e të kuptimit dhe nuk e shuan, është filozof i vërtetë.- Mondo estas placo ekspoziciita al pluvo kaj vento; tiu gradanta en tiu placo lumon de klopodemo kaj komprenemo kaj ne estingas ĝin, estas ja vera filozofo.

ENHAVO

Nia historio kaj agado

Kotizoj, biografioj, fotoj, librodonacoj

Instruado

Videokursoj, libroj, esperanto en bildoj

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Artikoloj el la revuo Esperanto, raporto de ILEI, ka.

Informaĵoj

Landaj kongresoj, konkursoj, novaj libroj

Leteroj

el Europo, Azio, Afriko, Ameriko

Artikoloj

el Albanio, Brazilo, Svisio,

Beletraĵoj

aforismoj el Uzbekio, humoraĵoj, poezioj, rakonto


Vojaĝoj

tra Pakistano kaj Ĉinio per la fitilo de s-ro So Gilsu, popolaj kostumoj el Albanio

Nia historio kaj agado

- Estas tempo por pagi kotizojn
Januaro finas kaj estas tempo pagi la kotizojn por nia asocio, por UEA kaj ILEI. Enlanda kotizo restas senŝanĝa, do 500 Lekoj. Rapidu!
Saimir Beqiraj- kasisto
- Vivo de Ĉefo Rauf Fico- esperantisto

Dr. Ing. Ĉefo Fico naskiĝis en la urbo Gjirokaŝtër, je 9-an de oktobro 1907. Tie li studis en elementa sepjara lernejo, poste gepatroj sendis lin al Italio kie Ĉefo finstudis mezlernejon kaj universitaton en Torino pri kosntru-inĝenierio. Dum la universitataj jaroj li konatiĝis kun Esperanto, skribis por la ĵurnalo "Studenti shqiptar" (Albana studento) en numeroj 2 kaj 3 de 1929 jaro pri la problemo de internacia lingvo kaj Esperanto. Li kompilis "Ĉelësin e gjuhës Esperanto" (Ŝlosilon de Esperanto) por albanoj. (Genevo, 1928, en 5000 ekzempleroj).



En la patrio li klopodis disvastigi internacian lingvon kiel lingvo de paco kaj bonkomprenemo inter diversaj popoloj de la mondo. Li abonis kelkajn esperantistajn revuojn, kiujn, traleginte, donadis al siaj lernantoj. Korespondis kun esperantistoj el Francio, Anglio, Italio, Bulgario, Sovetunio, Popola Ĉinio, Norda Vjetnamio, Aŭstrio, Germanio ka. Kvankam li estis invitita al kelkaj internaciaj kongresoj esperantistoj, la tiama reĝimo komunista malebligis al li ties partoprenon. S-ro Ĉefo kompilis ankaŭ broŝuron por studentoj kiuj deziris ellerni Esperanton, dum periodo 1950-1970 en la kulturdomo "Ali Kelmendi" en Tirana, same en sia laborloko (Ministrejo de Konstruado), en la fakultado de Historio kaj Filologio de la ŝtata universitato.

Estas kelkaj tradukoj al Esperanto de niaj klasikuloj kiel poemaro "Lamentoj" de Çajupi, kc. A-ro Çefo forpasis en Tirana pro grava malsano, je 20-an aprilon 1971. Li revadis ke Esperanto estu dua lingvo lernenda en niaj lernejoj. Tion li esprimis letere al la Centra Komitato de Kompartio, esperante ke Albanio fariĝu la unua lando enmonde realiganta ĝin. Sed sen sukcese. Li estis edziĝinta al sinjorino Nabahet, kun kiu havis du filinojn, Mira-n kaj Nora-n.

Narina Çefo Fico

- Baldaŭa vizito de du svisoj
Martomeze vizitos Albanion s-ro Andreas Kuenzli, akompanata de sia amiko, eksa oficisto de Ministerio pri Eksteraj Aferoj de Svisio. Por Andy ĉi tio estos dua vizito, post la unua, okazinta en la jaro 1993, aŭtune. Tiam li prelegis antaŭ 30 esperantistaj studentoj pri "Interna Ideo" de Zamenhofo.
Gjergji Gusho
- Niaj fotoj



S-ro Marius Note, eksa studento en Bydgoszcz pri Kulturo kaj Turismo Internacia dum sia vizito al Tirana. Li loĝas nun en Londono

- Zamenhofa naskiĝtago



Dum kunkafumado, la 15-an de decembro 2018, en Tirana, rememorante Zamenhofon..



Bardhyl kaj Martha

Instruado

- Videokurso

<https://www.youtube.com/watch?v=5vo8YNgQc7M&feature=youtu.be>

<https://www.youtube.com/watch?v=WTeNZxXlxc&feature=youtu.be>

<https://www.youtube.com/watch?v=p16-nNxmT1o>

(sendita de Josenilton)

- <https://jotakaeme.blogspot.com/2019/01/Esperanto.html>

PRI LA AKADEMIO DE LA PAROLO

Ni komprenas, ke dek minutoj da parolo ĉiutage sufiĉas por vekaj masaĝi certajn cerbajn korteksojn rilatajn al la parolkapablo, farante, ke oni pliboniĝas aŭtomate en la parolarto. Pro tio ni kreis grupon en WhatsApp por praktikado de la individua parolo. Ĝia nomo estas AKADEMIO DE LA PAROLO.

Ĉiu membro devas paroli dum preferinde dek minutoj ĉiutage, en Esperanto, kaj deponi siajn parolaĵojn en la grupon, celante plibonigi sian fluecon. Ne temas pri konversacia babilejo. Ĉiu prelegos nur por ekzerci sufiĉe bone sian parolecon, sen interrompoj, korektoj kaj postaj komentarioj de la aliaj.

La temoj estas liberaj.

Se vi volos membriĝi al tiu cerbogimnastika grupo, sendu aniĝ-peton al +5571986298883, informante vian nomon, loĝurbon kaj loĝlandon

<https://jotakaeme.blogspot.com/2019/01/algumas-novidades-traduzidas-em-janeiro.html>

PRI LA INSISTO PAROLI ESPERANTON

<https://www.youtube.com/watch?v=buMaxwYBIZo&t=391s>

- **Esperanto Bona Volo**

Koran Saluton el varma Brazilo!

Nome de la teamanoj de Esperanto-fako de Legio de Bona Volo (LBV), mi **dankas Vin** pro via afabla reago koncerne al niaj finjaraj bondeziroj.

Ni ŝatus reciproki Vin per la raporto pri kristnaska temo, **kun filmeto subtitolita en Esperanto** pri la muzikaĵo titolita **Jesuo, la Nutraĵo de la Popoloj**, kiun komponis la muzikkomponisto Paiva Netto.

Ĝi estas atingebla ĉe <https://goo.gl/4dyXMT>

En tiu raporto **ankaŭ estas trovebla ligilo** al la artikolo **Konstanta Kristnasko de Jesuo**, kiun aŭtoris la verkisto Paiva Netto. Ni aprezus se Vi sendus komenton pri ĝi por esprimi vian opinion. B.v. lasi vian skribaĵon en la taŭga skatolo de la koncerna paĝo.

Ni elkore antaŭdankas Vin per tiu eldiraĵo de la edukanto Paiva Netto:

“Kiu fidas Jesuon, tiu ne perdas sian tempon, ĉar Li estas la Granda Amiko, kiu ne forlasas amikon meze de la vojo”.

Ni deziras al Vi bonfarton kaj ankaŭ esperas pri kontinua kontakto en la jaro 2019.

Altestime, plej amike, Maria Aparecida da Silva www.religiodedio.org

- Esperanto en bildoj

Kio devenis el Ĉinio:

Kompaso



Proksimume antaŭ 4000 jaroj la ĉinoj inventis amuzan ludilon – tiel nomatan “Sudo-montrilon”.

Tio estis pupo, kiu (kiel ajn oni ĝin turnu), ĉiam rigardis al Sudo. Alian formon de Sudomontrilo vi povas vidi sur la apuda bildo. Tiu ĉi Sudomontrilo havis formon de kulero-ĉerpilo, bone polurita kaj glitanta sur speciala rando. Formo de tiu kulero-ĉerpilo imitis formon de Stelaro de Granda Ursino - Ĉiela Ĉerpilo. En la 11-a jarcento aperis naĝanta en akvo montrilo de kompasoj, farita en formo de fiŝeto. Kiam ĝi naĝis, ĝia kapo montris al Sudo. Aperis ankaŭ aliaj variantoj de kompasoj.



Alumetoj




La unuaj antaŭuloj de modernaj alumetoj aperis en 577 jaro de nia erao en Ĉinio. Tio estis malgrandaj pinaj bastonetoj, kiujn oni mergigis en fanditan sulfuron, poste ilin oni frotis laŭ io malmola kaj ili ekbrulis. Tiun inventaĵon oni dekomence uzis en la imperiestra palaco, sed poste ĝi disvastiĝis tra la mondo kun la nomo “bruligbastoneto”. En Eŭropo la unuaj specimenoj de alumetoj aperis en 1530, plej verŝajne tio estis portitaj el Ĉinio pere de vojaĝantoj, kiuj venis tien laŭ spuroj de Marko Polo.

Papero

(sendis Sergey)

- Leonid
Turkadze n3gd@mail.ru

**NOSTRADAMUS PROFETIS ESPERANTON.
DOKTORO ESPERANTO REALIGIS LA IDEON.
KUBANOJ APLIKAS LA LINGVON EN ETERO.
LA MONDO APLIKAS ESPERANTON EN INTERRETO.
ALIPLANEDANOJ PAROLOS KUN NI ESPERANTE.**



Ĉu profetaĵo pri EO....

El la plej profunda de la Okcidento de Eŭropo,
De malriĉaj homoj juna infano naskiĝos,
Kiu de sia lingvo grandan amason logos
Ĝia bruo ĉe la reĝado de la Oriento kreskos.

NOSTRADAMUS (1503-1566)

(El la malnova franca:

*"Du plus profond de l'Occident de l'Europe,
De pauvres gens un jeune enfant naistra,
Qui par sa langue seduira grande troupe
Son bruit au regne de l'Orient croistra.")*

CQ CQ CQ
Kiu ajn, kiu ajn
ESPERANTO!!!



<https://radioamatoro.blogspot.com/>
<https://qsl.net/co2mm/>
<https://www.pinterest.com/radioamatoro/>



© Can Stock Photo - csp39511365

131 jaroj



ESPERANTO





MATEN-MANĜO



PANO



LAKTO



BUTERO



OVOJ



MAIZ-FLOKOJ



JOGURTO



FROMAĜO



MARMELADO



MIELO



KAFO



TEO



SUKO

@Esperantofácil

Libroj

- Petr
Chrdle <chrdle@ka
va-pech.cz>

Karaj amikoj de Esperanto-literaturo,

dankon al tiuj, kiuj montris intereson pri la neregulaj informiloj de mia eldonejo KAVA-PECH. Mi konfesas, ke mi ĉi tiun duan informilon en Esperanto (la unuan mi dissendis fine de la jaro 2016) sendas ne nur al tiuj, kiuj mendis ĝin de nia retejo aŭ alimaniere, sed ankaŭ al tiuj, ĉe kiuj mi preskaŭ certas pri la intereso. Sed sciuj: **se vi ne deziras ricevadi ĝin** (kutime unufoje jare kaj neniam kun aldonajoj), **sufiĉas respondi per simpla "NE SENDADU" kaj ni tuj eligos vin el la dissendolisto.**

A) Novaĵoj de la libroj en Esperanto aŭ parte en Esperanto:

Unue mi devas mencii la furoran libron de Martin Stuppniĝ [Home en senhomeco. Militaj impresoj](#). La unua eldono estis disvendita dum unu jaro post la apero, kio estas en Esperantujo vera miraklo. Tial aperis jam la dua eldono, ampleksigita pri mia antaŭparolo pri Martin kaj lia konciza aldono "Pli poste" pri lia sekva vivo post la milito. Simile okazis kun la originalo de la libro *Kriegsimpressionen*, kiu ankaŭ estis disvendita, kaj mi do decidiĝis aperi ĝian duan

eldonon kun ĉiuj aldonaĵoj de la Eo-versio (krom la menciitaj ankaŭ pri historiaĵoj en la fono de la propra teksto, nome pri la batalo ĉe Montecassino kaj pri britaj militkaptitejoj en Afriko) sub la nomo [Menschlich in der Unmenschlichkeit. Kriegsimpressionen.](#)

La plej freŝa eldonaĵo estas la kolekto de lorenaj popolaj fabeloj [Lorenaj fabeloj en la loren-germana kaj en Esperanto](#), tradukita de Benoît Philippe, kun 20 ĉarmaj tutpaĝaj koloraj ilustraĵoj de Pavel Rak. Kiel klaras jam el la titolo, ĝi estas dulingva spegule aranĝita.

La ceteraj eldonaĵoj de ĉi tiu jaro estas [Pri la eklezio](#), la plej gravaj ĉapitroj de la ĉeĥa teologo Jan Hus laŭ elekto kaj en traduko de Gerrit Berveling, [Aliroj al Esperanto](#), almanaĥo redaktita de tri spertaj Esperantologoj C. Kiselman, R. Corsetti kaj P. Dasgupta, pritraktanta diversajn alpaŝojn al la fenomeno Esperanto flanke de renomaj fakuloj. [EES 8](#), la lasta numero de la serio de originaj Esperantologiaj studoj en Esperanto kaj en la angla, plentitole Esperantologio / Esperanto studies n-ro 8.

En la pasinta jaro 2017 aperis jenaj libroj: [La ŝtono de la amo](#), elektita poezio kaj poezia prozo de unu el la plej elstaraj nunaj poetoj de Kosovo Sali Bashota en traduko el la albana originalo fare de Bardhyl Selimi. [Francesko Valdomiro Lorenz](#), atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo (konata kiel lingvisto, poligloto kaj pedagogo, sed ankaŭ kiel naturkuracisto kaj por spiritistoj mediano, verkita de Vlastimil Novobilský, esperantigita de Margit Turková. [Heredantoj de silentado](#) de Sabine Dittrich, en traduko el la germana originalo *Erben des Schweigens* de Aleksandro Montanesko, estas romano, kies fabulo respegulas la komplikajn rilatojn inter germanoj kaj ĉeĥoj en la tempo post la 2a mondmilito, kiun la aŭtorino kompletigis pri la konciza historio de germanoj vivintaj sur la teritorio de Ĉeĥio. [Spirita revolucio en la koro de Eŭropo](#) verkita de Přemysl Pitter, en traduko de Margit Turková, prezentas elstarajn personojn en la ĉeĥa historio kaj de la ĉeĥa spirita tradicio de humanismaj idealoj (Hus, Komenio, Masaryk, ...). Ĝi enhavas ampleksan postparolon de Petr Chrdle pri la aŭtoro, deklarita per Unesko "Eŭropa humanisto" kaj portanto de la plej altaj ordenoj de Germanio kaj Israelo. [Granda Esperanta-ĉeĥa vortaro](#) de Miroslav Malovec estas ĝis nun la plej ampleksa Eo-ĉeĥa vortaro enhavanta proksimume 16 000 kapvortojn kaj 40 000 vortderivaĵojn.

Krom tiuj novaĵoj aperis alpresoj de la elĉerpita tria eldono de la verko de Petr Chrdle [Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj](#). Temas pri la priskribo de spertoj de la aŭtoro el profesia uzado de Esperanto en internaciaj rilatoj samrajte kun la ĉeĥa, angla kaj germana lingvoj.

Krom la novaĵoj certe valoras al via rigardo ankaŭ la ceteraj libroj el la momenta oferto de la eldonejo. Tiujn en Esperanto vi trovos ĉe <https://kava-pech.cz/Esperanto>.

B) Rabato de 50 % okaze de Zamenhof-tago valida **por la mendoj ricevataj inter la 15a de decembro kaj 15a de januaro 2019 kaj kiuj enhavas la rimarkon "Porokaza rabato"** (tio necesas, ĉar ni ne ĉiujn mendojn komparas kun la dissendolisto de la informilo). La rabato validas por jenaj du grupoj da libroj:

B1) Niaj libroj envicigitaj en la [serion Oriento-Okcidento](#) fare de UEA: [Aventuroj de brava soldato Ŝvejk](#) dum la mondmilito de Jaroslav Hašek en traduko de Vladimír Váňa, kun ilustraĵoj de Josef Lada, verko, tradukita en preskaŭ ĉiujn lingvojn; [R.U.R.](#), Rossumaj universalaj robotoj, la dua eldono de la mondfama sciencfikcia dramo de Karel Čapek, verkita antaŭ preskaŭ 100 jaroj kaj tamen nun nekredible aktuala. En ĝi estis uzita la unuan fojon la termino *robot* por artefarita homsimila inteligenta estaĵo, kiu sekve disvastiĝis en preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo kaj fariĝis eĉ faka termino. Ĝin tradukis Josef Řebíček kaj ilustris Miroslava Tomečková; kaj [Biblio](#), la baza sankta skribo por ĉiuj kristanoj, en tradukoj de L. L. Zamenhof (Malnova Testamento), J. C. Rust, B. J. Beveridge kaj C. G. Wilkinson (Nova Testamento) kaj Gerrit Berveling (Duakanonaj Libroj) kaj redakta preparo pere de la ekumena komisiono de IKUE kaj KELI.

B2) La plej karaj libroj al mia koro:

El **poezio** temas sendube pri la verkoj de mia amata **poetino Eli Urbanová**, nome [Prefere ne tro rigardi retro](#) kaj [Rapide pasis la temp'](#), la dua kun ilustraĵoj de Pavel Rak.

El **Esperanto-lerniloj** jen la verkoj, kiuj kaptis min kaj kiuj laŭ mi ne devus manki en libraro de ĉiu komencinto aŭ pereganto: [Bonvenon en nia mondo](#) de Bent Jensenius, legolibro en simpla Esperanto kaj samtempe lernolibro pri la Esperanto movado; kaj [Rimenigmoj](#) de Elena Popova kun ĉarmaj ilustraĵoj de Miroslava Tomečková, kie la leganto devus kompletigi ĉiun rimon. Kiel enhava helpilo ĉiam servas la ilustraĵo kaj kiel lingva helpilo solvoj fine de la libro, krom Esperanto en 13 naciaj lingvoj. Ĝi celas infanojn, tamen ĝi certe kaptos intereson ankaŭ ĉe plenkreskuloj.

El **faka literaturo** precipe: [Kompleksia medicino kaj Saam akupunkturo](#) de doktoro pri orienta medicino Puramo Chong en traduko de Zdeněk Pluhař; kaj [Kompendio de psikoanalizo](#) de Sigmund Freud en la traduko de alia psikoanalizisto Gérard Patureau; en ĝi la aŭtoro mem resumis kompreneble ankaŭ por nepsikologoj siajn antaŭajn studojn.

El **literaturo de fakto**, kio estas de mi la plej ŝatata literatura branĉo, mi nomu almenaŭ: [Heroo de amo](#) de Karel Kraft, priskribanta la vivon kaj verkon de la ĉeĥa kristana humanisto Přemysl Pitter, kiu plej konatiĝis kiel savinto kaj edukanto de judaj kaj germanaj senparencaj infanoj; lia edukejo estas verŝajne ununura loko, kie post la dua mondmilito kunvivis kaj estis komune edukataj judaj kaj germanaj infanoj. [Taglibro de mia frato](#), Memornotoj de Petr Ginz el la jaroj 1941-1942, de Chava Pressburger, en traduko de Vlastimil kaj Věra Novobilský, priskribas travivaĵojn de tre talentita knabo, kies vivo estis interrompita kruele en la aĝo de 16 jaroj en gaskamero en Aŭŝvico. La aŭtorino, lia fratino, aldonis multajn klarigojn kaj faktojn pri Petr kaj ankaŭ pri la vivo de judoj en Prago post ekvalido de rasaj leĝoj.

Mi aldonu ankaŭ unu libron en la angla, verkita de sperta esperantisto kaj longdistanca skikuranto Hannes Larsson [Cross-Country Skiing around the World](#), en kiun la aŭtoro enmetis informriĉan ĉapitron pri Esperanto. Ĝi jam levis seriozan intereson ĉe pluraj skikurantoj, kion mi scias de iliaj demandoj direktitaj al la eldonejo, kie ili povus trovi esperantistojn loĝantajn en ilia ĉirkaŭaĵo. Jen ekzemplo de la plej perfekta infektado de samhobianoj per Esperanto.

Atentu niajn [komercajn kondiĉojn](#), laŭ kiuj ni aldonas la sendokostojn 10 % de la nerabatita prezo de la libroj, minimume 5 € (la veraj sendokostoj estas bedaŭrinde eĉ pli altaj).

Kune kun tiuj rabatitaj libroj vi povas mendi samtempe ajnajn librojn de nia oferto ĉe <https://kava-pech.cz/Esperanto>, kiuj tamen estos fakturitaj kun la daŭra rabato 10 %.

C) Preparitaj novaĵoj:

La ununura verko en Esperanto, nun preparata por la eldono, estas [La gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj](#) de la aŭtoroj Reinhard Fössmeier kaj Hans Michael Maitzen, ne nur priskribanta la gregorian kalendaran reformon kaj ĝiajn postefikojn al diversaj historiaj eventoj, sed ankaŭ enhavanta la koncernan papan buleon el la jaro 1582 (dulingve, en la latina originalo kaj en Esperanto).

La kialo, ke momente ne estas preparataj pliaj eldonaĵoj en Esperanto ne signifas, ke mankus valoraj manuskriptoj. Kio mankas, estas aĉetantoj de la jam eldonitaj verkoj kaj do sekve la mono bezonata por plia eldonado. Tial vi per viaj mendoj ne nur riĉigos vian librokolekton aŭ faros ĝojon al iu via amiko, al kiu vi ĝin donacos, sed samtempe vi ankaŭ subtenos la eldonejon, por ke ĝi povu eldoni pliajn librojn. Por tiu celo ankaŭ **ebblas mendi librojn kaj komisii nin forsendi ilin vianome al konkreta adreso de via amiko**, aŭ, kiel faris ekzemple unu aŭstro, komisii nin sendi la menditaĵon ekzemple "al Afrika esperantisto laŭ nia elekto". Tiukaze la mendanto kompreneble ricevos la informon, al kiu la libro(j) mendita(j) de li aŭ ŝi estis sendita(j).

Fine mi deziras al vi gajajn Kristnaskajn kaj jarŝanĝajn festotagojn, kaj dum la tuta jaro 2019 firman sanon kaj multe da ĝojo, laŭeble ankaŭ kun la libroj de mia eldonejo.

Petro Chrdle, posedanto de la eldonejo [KAVA-PECH](#), +420 736 645 455


- Novaj titoloj

Tiu ĉi ĝisdatigo estas sendata al vi sekve de via kontribuo al la retejo verkoj.com. Se vi ne volas ricevi tiajn ĝisdatigojn, bonvolu [informi](#) nin.

Jen la novaj verkoj en verkoj.com:

- Forpasis [Amos Oz](#) (1939-2018), fama Israela verkisto. Lia rakonto "[Esperanto](#)" (pri Esperanto!) estis tradukita al Esperanto kaj aperas en [tiu ĉi retejo](#).
- [Al Baldur Ragnarsson](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#) 28/12/2018
- [Sendante la morton marsen](#) - poemo de [Ediberto Bentes Pinna](#), tradukis: [Célio Freitas Martins](#), bildigis: [Liette Lêla](#) 23/12/2018
- [Filino de Rappaccini](#) - rakonto de [Nathaniel Hawthorne](#). Tradukis [Barry Friedman](#) 20/12/2018
- [Recepto por Bananokrema Torto](#) - [Barry Friedman](#) 20/12/2018

- [La palacmastrino](#) - dramatika teatraĵo de [Lea Goldberg](#). (pdf) [Mallongigita versio por surscenigo](#) (pdf) Tradukis [Doron Modan](#) 18/12/2018
- [La urso](#) - teatraĵo de [Anton Pavloviĉ Ĉeĥov](#). Tradukis Helena Goldinova helpe de [Doron Modan](#) 18/12/2018
- [Miaj memoj](#) - pensero de [Maria Nazaré Laroca](#) 18/12/2018
- [La unua melodio de La Espero](#) - [Doron Modan](#) Ludas kaj kantas la originalan unuan melodion de La Espero fare de [Claes A. Adelsköld](#)
- [Esperanto](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#) 17/12/2018
- [Okazoj](#) - de [Daniil Ĥarms](#) - Tridek klasikaj amuzaj, absurdaj, komediaj rakontoj. Tradukis Dimitrio 16/12/2018
- [La tragedio de l'homo](#) - klasika teatraĵo de [Imre Madách](#), tradukis [Kálmán Kalocsay](#) 14/12/2018
- [L' arbo de Kaŝambuo](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#) 09/12/2018
- Kantado de la kanto [Sterilulino](#) - fare de [Israela Becker](#). Ludado - Doron Modan 08/12/2018
- Kantado de la kanto [Decembro](#) - fare de [Israela Becker](#). Ludado - Doron Modan 17/11/2018
- [Limoj](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#) 04/11/2018
- [Ĉu kredanto ateisto](#) - poemo de [Célio Freitas Martins](#), bildaranĝis [Liette Lêla](#) 28/10/2018
- [Maro lago kaj virino](#) - poemo de [Ediberto Bentes Pinna](#). Tradukis: [Célio Freitas Martins](#), bildaranĝis: [Liette Lêla](#) 28/10/2018
- [Amoron farendas duope](#) - poemo de [Ediberto Bentes Pinna](#). Tradukis: [Célio Freitas Martins](#), bildaranĝis: [Liette Lêla](#) 28/10/2018
- [Sentoj](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#) 18/10/2018
- [La unua ĉapitro](#) el la libro **Tagordo** de Eric Vuillard aperas en [gustumaĵoj](#). tradukis: Jean-Claude Roy.




Z4 Eldonoj publikigos komence de novembro 2018 la version en Esperanto de la libro de Eric Vuillard "L'ordre du jour" (Tagordo). Tiu libro gajnis la plej prestiĝan literaturan premion en Francio en 2017, la premion Goncourt. Pro la temo, la libro admirinde taŭgas por tiu traduko al Esperanto. *Dudek kvar ili estis, apud la mortaj arboj ĉe la riverbordo, dudek kvar nigraj, brunaj aŭ konjakkoloraj surtutoj, dudek kvar paroj da ŝultroj lanremburitaj, dudek kvar tripecaj kostumoj, kaj la sama nombro da pantalonoj kun pinĉofaldoj kaj larĝa orlo. La ombroj penetris en la grandan vestiblon de la palaco de la Asemblea prezidento; sed baldaŭ ne plu ekzistos Asembleo, ne plu ekzistos prezidento, kaj, post kelkaj jaroj, eĉ ne plu ekzistos Parlamento, nur amaso da fumantaj ruinoj.* Jam de nun, ni invitas vin antaŭmendi. Kompense ni proponas la libron por vi je 15€. Por antaŭmendo, bonvolu alklaki la ligilon -

<https://z4editions.fr/publication/tagordo/>

- Libro-donaco el Japanio, "Surstrate en Tokio".

Lastan tagon de 2018 atingis nin speciala donaco- la libro "Septembre surstrate en Tokio". Ĝi venis el Hokajdo, Japanio. Temis pri la terura tertremo en 1923 kiu detruis notindan areon en Tokio kaj mortigis pli ol 100 mil homoj. Sed tio kion la aŭtoro Kato Naoki (tradukita de Mamiya Midori) akcentas sian bedaŭron kaj pardonpeton pro posttertrema masakro de japanoj kontraŭ ĉianaj kaj koreaj enmigrintaj tie.



Lia mesaĝo estas por paco inter popoloj.

Ni petis ĉefdelegiton por Japanio por ke li sciigu la readreson de sendinto, cele por danki.
Jen respondo:

Miyazawa Naoto estas reprezentanto de “LIBERA ESPERANTO-ASOCIO en HOKKAJDO”.

Lia ret-adreso troviĝas sur kolofono de la libro, tio estas

naoto_5Esperanto@yahoo.co.jp

amike via, Nisinaga Atusi (NISINAGA Acuŝi)

Ĉefdelegito de UEA en Japanio

acero@an.email.ne.jp

西永 篤史 (にしなが あつし)

Tiam ni sendis nian dankmesaĝon kiel jene:

Karaj, mi ĝojas ke danke al ĉefdelegito s-ro Atusi sciigis la retadreson de s-ro Miyazawa. Estis bela surprizo ke la 31an de decembro nin atingis ekzemplero de libro Septembre surstrate en Tokio.

Mi komencis legi ĝin kaj eĉ aperigis tion sur mia vizaĝlibra paĝo Bardhyl Adem Selimi.

Mi gratulas japan aŭtoron kaj ties Esperanto tradukinton pro tia monografio interesa.

Japanion trafas regule tertremoj, iom simile ankaŭ nian landon malgrandan Albanion. Sed japanoj sin montris tre bravaj kaj laboremaj. Mi ĝojas ke la aŭtoro preter faktoj pri tertremo alportas atestaĵojn vivecajn de homoj travivintaj tion. Ankaŭ la mesaĝo humaneca kontraŭ rasismo estas ankoraŭ aktuala.

Ankoraŭ dankon, amike Bardhyl, sekretario de la Albana Esperanto-Asocio

Bova libro

- **HORI Jasuo**

La libro “Ĉiutaga Vivo tra la mondo” aperis hodiaŭ.

Antaŭ pli ol 10 jaroj mi jam eldonis la librojn “Monatoj tra la mondo” kaj “La vivo tra la mondo” el eseoj el diversaj landoj. Poste mi kolektis eseojn pri ĉiutaga vivo tra la mondo, sed poste okazis la UK en Japanio, mia estraranigo de UEA kaj poste la Japana Katastrofo, tial mi ne havis tempon por redakti ilin.

Lastan jaroj japanino s-ino Arase laboris por mi por redakti eseojn, kaj fine mi povis redakti la libron. La libro konsistas el eseoj de 23 esperantistoj el Vjetnamio, Rusio, Belgio, Finnlando, Germanio, Francio, Serbio, Ĉinio, Brazilo, Kroatio, Koreio, Japanio, Togolando, Hungario, Mongolio, Tajlando, Turkio, Nepalo, Burundo, Irano.

La temoj estas jenaj:

1. Mang^aj^oj 2. Vestaj^oj, 3 Domoj 4. Dorlotbestoj 5. Sporto 6. Lingvoj 7. Sanigaj terapioj 8. Hobioj 9. Malnovaj raklontoj 10. Festoj 11. religioj 12. Konstitucio pri milito kaj paco 13. Proverboj

La libro havas 240 pag^ojn en B5-formato. La prezo estas 12 eu^roj. Nur per Esperanto oni povas kolekti tiujn eseojn el diversaj landoj. Nur esperantistoj povas g^ui la libron. Poste mi sendos la libron al Libroservo de UEA, sed por tio oni bezonas multajn tagojn. Vi povos mendi rekte de mi. Vi povos pagi al mia UEA-konto.

HORI Jasuo (s-ro)

371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3

Ĉiutaga Vivo tra la Mondo



Horizonto

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Kion diris

Bertrand Russell pri Esperanto al sia studento M.H. Sahebzamani?

Said Baluĉi

Sojle de la 88-jariĝo (28.01.1931) de tiu studento, se mi retrorigardas, el inter tiom da liaj aktivadoj, plej unue mirigas min lia kuraĝo. Ne partizana kuraĝo, kiu kaŭzas morton kaj mortigon en despota socio sen akiri ajnan sistemŝanĝon, sed saĝa kuraĝo, kiu iam kondukis lin al la tiama orienta Germanio por ekstudi *Das Kapital* de Karl Marx en la originala lingvo ĉe ideologo de la komunista partio, por ne fidi nur al tradukoj, kaj kiu iam kondukis lin al Anglio por tri semestrojn studentumi junaĝe ĉe la fama filozofo Bertrand Russell (1872–1970) kaj dume demandi lian moŝton i.a. pri Esperanto!

Kion diris Bertrand Russell, tio kompreneble gravas por niaj historiistoj, sed por mi pli gravas tia memstara pensmaniero, kiu, anstataŭ propagandi tiun aŭ tiun ĉi ideologion, kuraĝigis nin memstare pensi.

D-ro prof. M. H. Sahebzamani tre bone konas ideologiojn kaj pensmanierojn kaj danke al sia studado ĉe Russell lertas pensi logike kaj instrui logikan pensmanieron. Tial lia konduto en la Esperanto-movado estas iom malfrue digestita!

Dum la furoro de la Esperanto-movado en Irano (1974-1980), li ade avertis ke kluba kaj asocia aktivadoj, kvankam bonaj, ne sufiĉas. Esence konduki Esperanton en la edukadon enradikigos ĝin.

Li okazigis 145 bazkursojn kaj 43 mezkursojn kaj ankaŭ gvidis 12 universitatnivelaĵajn studojn pri Esperanto, el inter kiuj ankaŭ mian magistrigan disertacion kiu temis pri esperantigo de persaj prozaj kaj poeziaj specimenoj. Dum plej multaj el tiuj, ofte ekstre malfacilaj, aktivadoj akompanis lin Ĵila Sedighi, sen kies lerto kaj entuziasmo la irana movado ne estus tiom vigla.

Kaj hodiaŭ li plej feliĉas, ĉar la universitato “Jame Elmi Karbordi” aprobis ke Esperanto estu unu el la (sub)branĉoj de ĝiaj tradukfakoj.

Liaj Esperanto-aktivadoj, kaj plej unue verki decan lernolibron, sendube estas modelo por MONA-landoj. Li verkis la faman lernolibron *La dua lingvo*.

La nunaj iranaj esperantistoj, ĝenerale, spertis la periodon de *la verda domo*, kiun li luis proksime de la *Tehrana Universitato* kaj tie li instruis Esperanton ekde 1980 ĝis 1991.

La memoroj forportis min. Do, jen la eldiro de Bertrand Russell pri Esperanto: “*Inter la lingvoj, Esperanto estas la plej proksima al la matematika kaj logika idealo pro sia senescepta regularo*”.


(ĉerpita el la revuo Esperanto)

• Novaĵoj de Mirejo, la 6-an de januaro 2019

Karaj geamikoj,

Mi esperas, ke vi fartas bone, ke vi bone glitis el 2018 al 2019 kaj ke vi komencas tiun novan jaron energioplenaj kaj riĉaj je pozitivaj projektoj. Bonvole ricevu miajn plej elkorajn bondezirojn, por ke ĉio konkretiĝu laŭ viaj esperoj.

Kutime gvidas min mia agendo en la listigado de la eventoj en la finiĝanta jaro. Sed en 2018, ekzakte la 22-an de septembro, en Neuchâtel, svisa urbo, kie mi loĝis en mia junaĝo, oni ŝtelis al mi mian sakon kun ene mia monujo, miaj bankokartoj, mia fotilo, miaj okulviroj, mia

stirpermesilo... La ŝtelisto estas sviso... konsekvence estas riska afero resti hejme...  Do mi provos skizi por vi mian jaron 2018 helpe de miaj fotoj.

En marto mi povis salti al Maroko por Esperanto-Kongreso en Marrakech, kaj mi longigis mian restadon por sola malkovri la urbon Fez. Belege. Fotoj vidiĝas sur mia

bloĝo <https://mirejo3.blogspot.com/>

En aprilo mi estis por privata restado en Parizo kaj Budapeŝto. Tio okazas al mi ankaŭ.


En junio mi volis sperti la poliglota kunvenon ; mi partoprenis ĝin en Bratislavo, Slovakio. Lingva bano ene de 500 gejunuloj...

Julio : la kongresa monato. ILEI kunvenis en Madrido. Plena semajno kun intensa laboro, kun elektoj. Mi elektiĝis denove kiel prezidanto por tri jaroj. Laboro... laboro... sed mi ne rajtas plendi, ĉar mi konsentis preni tiun oficon.

Aŭguste mi saltis el Madrido al Lisbono por la Universala Kongreso de UEA. Mi limigis mian partoprenon tie por iom viziti la urbon kaj por ĝui la vivon sidante sur trinkejteraso aŭ en ŝipo. Post Lisbono, ĉar mi jam estis en Iberio, mi volis viziti Cordoba kaj Granada, du belegajn urbojn en Andaluzio. Malgrandaj hoteloj, trankvilaj promenadoj, gitaraj koncertoj, kulturaj malkovroj, giganta plezuro.

La unuan de oktobro mi flugis al Katmanduo por du semajnoj por viziti nepalajn amikojn. Poste mi flugis el Nepalo al Benino, tra Istanbulo. En Kotonuo mi restadis trankvile ses semajnojn ; mi povis bone labori kaj inter aliaj okupoj plu verki mian libron « Lagoj kaj Larmoj », kiu ebligas al esperantistaj afrikanoj el la Grandlaga Regiono rakonti pri la milito tie kaj pri sia ĉiutaga vivo en tiaj cirkonstancoj. Mi ankaŭ renkontis esperantistojn el la kotonua regiono.

En decembro mi estis denove hejme en Les Brenets. Okazas, ke mi estas en Svislando, trankvile

hejme...  Sed laboro abundas : la vilaĝa parlamento, en kiu mi membras, komisionoj (ni laboras pri kunigo de mia vilaĝo kun la najbara urbo Le Locle), agadoj por subteni nian trajnlinion LE REGIONAL, koncertoj, prelegoj (mia listo enhavas pli ol 50 titolojn) iom da laboro en ĝardeno, vartado kaj riparo de la domo, kiu ne apartenas al mi, malfermita tablo unufoje monate por maljunuloj, kaj LA FAMILIO : miaj du filinoj, miaj du bofiloj, miaj tri nepoj alportas al mi ĝojegon en bela harmonia etoso. Miaj du filinoj informas min kaj edukas min en plej diversaj kampoj : valoraj konsilantoj kaj helpantoj.

Vi povas vidi fotojn sur mia bloĝo : <https://mirejo3.blogspot.com/> temas pri ĉapitroj.

Mia Facebook-paĝo ebligas al mi esprimi opiniojn kaj/aŭ emociojn laŭ la nubaj siluetoj dum tagiĝo en Kotonuo.... <https://www.facebook.com/profile.php?id=1024660125>

Mi elkore salutas vin kaj deziras al vi ĉion bonan por 2019 !!

Mirejo

Mi dankas al tiuj, kiuj sendis al mi novaĵojn kaj bondezirojn.

- **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2018-10-15 ĝis 2019-01-15.

Vivo de la Ligo - eventoj

La 5-an de decembro kadre de Tago de la Libro okazis **Komuna Legado** de Esperanto-teksto. Tio jam iĝis bona tradicio de la Ligo – organizi komunan Eo-legadon. Ĉi-jare estis proponita poemo de Julian Hernandez Angulo el Kubo.

Januare flanke de la Estraro okazis **kontrolo de la personaj datumoj** de niaj sekciestroj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj kongrue kun la novaj leĝoj pri privateco de Eŭropa Unio. La reagoj venas de tiuj, kiuj permesas la aperigon de sia nomo en la retpaĝo de ILEI; la Estraro kore dankas pro respondoj kaj petas ankaŭ de la aliaj plu anonci sian decidon rilate al la postuloj de la leĝo.

70-jariĝo de ILEI

2019 estos la jaro de la jubileo de ILEI – ĝi iĝis 70-jara! Gratulojn al ĉiuj ĝiaj membroj kaj dankoj al ĉiuj, kiuj portis ĝin dum tiom da jaroj! Ni deziru al nia Ligo vivi plu kaj plu, prosperi kaj ĝui sukcesojn en tutmonda disvastigo de Esperanto kaj efika instruado de la lingvo!

Okaze de tiu jubileo la Estraro akceptas kaj bonvenigas iujn ajn ideojn pri instruado de Esperanto, pri la Ligo mem, pri ĝia festo, ĝia evoluo, ĝia kresko ktp, ktp...

Tamen por atingi tiujn celojn, necesas multe kaj multe labori.

La Estraro komencis pripensi kaj prepari la celebron de la jubilea por la Ligo jaro. Estis kreita emblemo de la jubilea jaro, proponita plano de celebraj eventoj. La Estraro esploras diversajn informfontojn pri la historio kaj agado de la Ligo. Estas serĉata kunordiganto por la tuta evento. La Estraro planas kreadon de filmo, dediĉita al agado de ILEI kaj ĝia jubileo.

La Estraro

Sukcese daŭras retaj kunsidoj de la Estraro. Ili okazas pli-malpli regule kaj efike. Ekde decembro la Estraro komencis uzi la sistemon “Zoom”, kiu havas pli bonajn eblojn ol Skype. La lastan kunsidon fine de decembro partoprenis la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kiel observanto. Estis pritrakitaj diversaj kampoj de kunlaboro inter ILEI kaj UEA.

Estas planata fizika estrarkunsido en Les Brenets, Svislando, la 24-27-an de januaro. Ĉeeste partoprenos 3 estraranoj, aliaj rete.

La Estraro kontrolas la ĉefan paĝaron de la Ligo, kongrue kun la lastaj eŭropaj leĝoj pri privateco.

La Prezidantino Mireille Grosjean partoprenis forumon de OSI (Internacia priscienca celaro, www.osi-ngo.org) en Ĝenevo ĉe UN. Unu tago el ĝi estis dediĉita al la temo Turismo, kiu estis ankaŭ la ĉeftemo de la ILEI-kongreso en Pusano, Sud-Koreio, en 2017. M. Grosjean proponis paroladon. Dum la permesita 6-minuta paroldaŭro (laŭ Pecha Kucha sistemo el Japanio) ŝi prezentis Eon kiel efikan manieron respektplene rilati kun lokanoj.

Kapabligo

EIT – Esperanto-Instruista Trejnado

La Estraro povas anonci, ke finfine solviĝis la problemoj pri la planita seminario en Kotonuo novembro pri EIT – Esperanto-Instruista Trejnado. Ekzistis du problemoj: la unua – ke neniu finfaris la retan studadon. La dua – ke la buĝeto por la staĝo en Kotonuo por 6 personoj atingis 6000 EUR-ojn, sumon tre altan.

La Prezidantino Mireille Grosjean proponis jenan solvon : organizi EIT por Afriko dum la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA, okazonta en Bujumbura fine de decembro 2019. En la listo de kandidatoj 7 estas en Burundo, tial ILEI ne devos pagi por ili multekostan flugon. Nur kvar devus veni al Bujumbura. Same la Prezidantino iros kaj gvidos la ĉeestan semajnon. Tiel la

buĝeto malkreskos. Krome, la nova dato donas plenan jaron por la studoj. Januare evidentiĝis, ke, bedaŭrinde, kvar kandidatoj de EIT el Afriko ne sukcesis fini la antaŭviditan programon el du lecionoj pri gramatiko kaj du lecionoj pri metodiko ĝis la 31-a de decembro 2018, kiel estis planite. La Estraro triste devis anonci al ili, ke ili falis el la programo. Verŝajne, la studado estis pli ampleksa kaj postulema kaj la teknikaj aspektoj pli malfacila. La Estraro esperas, ke ili tamen progresos kaj en la uzo de Esperanto kaj en la praktikado de instruado, kaj ke alia eblo montriĝos por lertiĝi.

Do, la kvanto de trejnataj de EIT malkreskis. La Estraro tamen esperas, ke la aliaj sukcesos fini la programon kaj ke la planita EIT en Afriko fine de 2019 okazos.

Universitata agado

La Nitobe-simpozio okazinta en Lisbono la 4-an kaj 5-an de aŭgusto estis momento, kiam kvindek da fakuloj priskribis la situacion de la apero de EO en la universitatoj kaj skizis la bezonojn. Tuj vidiĝis, ke la Komisiono de ILEI situas en centra loko de tia agado kaj povas ludi gravan rolon. Esperantic Studies Foundation (ESF) kontribuas nun al la aktivigo de la Universitata komisiono de ILEI kaj komisiis al Angela Tellier instigi la laboron. En oktobro 2018 ekfunkciis laborgrupo konsistanta el Angela Tellier (AT) flanke de ESF kaj el membroj de Universitata komisiono de ILEI: Renato Corsetti (RC), Vicente Manzano-Arrondo (Viko, VMA)) kaj ILEI-estrarano Radojica Petrović (RP). Al ĝi poste aliĝis Elisée Byelongo (EB) kaj Kimura Goro Christoph (KGC). La komisiono funkcias retpoŝte, skajpkunsidas unu fojon ĉiumonate kaj komunikas siajn planojn kaj rezultojn al aliaj membroj de la plena Universitata komisiono kaj al la prezidanto de ILEI por ebligi iliajn kontribuojn al la planado kaj realigado. Ĝi:

- Reaktivigis la retpaĝon ĉe la retejo de UEA

(RC): [https://uea.org/vikio/Informoj de la komisiono pri %22Esperanto en universitatoj%22](https://uea.org/vikio/Informoj_de_la_komisiono_pri_%22Esperanto_en_universitatoj%22)

- Decidis plu uzi la registron de kursoj pri Esperanto aŭ interlingvistiko ĉe edukado.net, kies programon necesas adapti por aparte indiki la universitatajn kursojn distinge de la mezlernejaj kaj aliaj

- Konstatis la utilecon kaj rekomendas plu uzi la informojn el <http://kunagade.org/raporto-esf-2018/>

- Proponas aldonon de paĝo al la retejo de ILEI pri la laboro de la komisiono, ĉefe por interna uzo (RP kun Jozefo Nemeth) kun konstato, ke la kvar menciitaj paĝoj ne estas redundaj sed suplementaj kaj sinergiaj.

- Tradukigas bazan flugfolion pri la ekzisto kaj laboro de ESF, inkluzive la haveblecon de stipendioj.

- Ricevis sep 1-paĝajn "Unuo"jn verkitajn de VMA pri la sekvaj temoj:

- Pri la universitato kiel ne taŭga loko por Esperante labori
- Pri la neĉeesta universitata "movigebla" seminario
- Sistema por universitataj aktivuloj
- Esploro pri la kialoj de sukcesoj kaj ne sukcesoj de universitataj kursoj pri Esperanto
- Datumbaza sistema por esperantistoj universitatoj
- Internacia reto de universitatoj pri lingva justeco
- Kion ni celas pri Universitato kaj Esperanto

La nun plenumataj taskoj, dividitaj inter la komisionanoj, estas:

1. Universitataj kursoj pri Esperanto aŭ interlingvistiko (RC)
2. Listo de universitataj instruistoj kaj esploristoj kiuj konas Esperanton registrata en viki-paĝoj de UEA (RC)
3. Intervjuoj kun esperantistoj universitatanoj el diversaj kontinentoj (VMA)
4. Universitataj esploroj pri Esperanto aŭ interlingvistiko (AT)
5. Esperantistaj konferencoj universitatnivelaĵ, unuavice la du okazantaj dum ILEI-kongresoj en 2019 kaj 2020 (RP)
6. Partopreno de esperantistaj universitatanoj en neesperantistaj konferencoj kun ebla stipendio de ESF (ĉiuj)
7. Lernolibro por universitataj kursoj (AT)

Estas dezirinde povi krei subgrupon de agantoj por ĉiu agadpunkto, ne nur el ĉi tiu komisiono, sed ankaŭ el la ĝenerala ILEI-a kaj universitatmedia membraro. Kiu pretas helpi pri iu specifa agadpunkto, bonvolu anonci sin.

Januare okazis voĉdono en la ILEI-estraro pri la mastrumantino de edukado.net D-ino Katalin Kovàts, por ke ŝi eniru la Komisionon de ILEI pri Universitata Agado. La Estraro kun ĝojo anoncas, ke ŝi estis unuanime elektita. Do, gratulojn al Katalin kaj plenajn sukcesojn al sekva kunlaboro!

Kongresoj

La 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio

Funkcias la reta aliĝilo <https://goo.gl/forms/TOrY5bltJtK0BKeG2> . Novaĵoj estas komunikataj tra la fejsbuka grupo ILEI-kongresoj kaj aliaj komunikkanaloj. Aliĝis la unuaj partoprenontoj el Bulgario, Svislando, Francio, Serbio kaj Ĉinio. Laŭkutime, pli amasa aliĝado venos antaŭ fino de la unua aliĝperiodo (ĝis la fino de marto), kun la malplej altaj kotizoj.

En la ĝisnunaj preparoj estas difinitaj du ĉefaj aksoj de la kongresa programo:

- Solenado de la 70-a datreveno de ILEI
- Traktado de la kongresa ĉeftemo “Lernado en virtualaj komunumoj” en kunteksto de la *Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj 2019* proklamita de UN (subtemoj: Virtualaj lernkomunumoj de indiĝenaj lingvoj, Lernado de indiĝenaj lingvoj en virtuala medio)

La estrarano pri kongresoj kaj LKK interkonsentis kun la estraro de la kongresurba Fakultato de Teknikaj Sciencoj, gastigonto de la kongreso, ke enkadre de la kongreso okazu trilingva (Esperanto, la serba, la angla) internacia konferenco pri la kongresa temo kun la Fakultato kaj ILEI kiel kunorganizantoj. Tio ebligis, ke:

- La *Edukministerio de Serbio* povos agnoski la konferencon en sia registro de internaciaj konferencoj donantaj al siaj partoprenantoj certajn poentojn por avanco en la universitata kariero.
- La *Serbia Instituto pri Progresigo de Edukado* povos rekoni ĝin kiel seminarion por mezlernejaj kaj bazlernejaj instruistoj, kiuj bezonas partoprenon en fakaj seminarioj por pluvalidigo de la instruista licenco.

La *Fakultato* tra siaj komunikkanaloj kaj organizaj rilatoj entreprenos paŝojn por atingi tion kaj por varbi neesperantistajn partoprenontojn. Tio, kaj la iniciatita kunlaboro de LKK kun la serbia sekcio de AEDE, donos ekstermovadan institucion subtenon al la popularigado de Esperanto inter universitataj, mezlernejaj kaj bazlernejaj instruistoj en Serbio.

Aliaj programaksoj de la kongreso, la kultura kaj turisma, por nun estas traktataj de LKK kunlabore kun loka virina kantgrupo “Lira” (Liro), infana folkloro grupo “Bambi”, Etno-metiista

asocio kaj Turisma organiza organizaĵo de la kongresurbo Ĉaĉak, kaj estos ankoraŭ traktataj kun aliaj esperantistaj kaj neesperantistaj kulturkreatoj kaj turismaj agentejoj.

Sekva kongreso en 2020

ILEI per la laboro de sia estrarano pri Kongresoj Radojica Petrovic rilatas kun Guy Matte kaj Suzanne Roy por havi rilatojn kun universitatoj en Kanado, rilate al la ILEI-kongreso en 2020. La laboro survojas.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Oktobre okazis estrara voĉdono pri la nova sekciestro en DR Kongo. La estraro de ILEI gratulis Sinjoron Florent Ntoto en la posteno de la sekciestro de la kongolanda ILEI-sekcio.

La Estraro rememorigas, ke venis tempo por sendi la jarajn raportojn, kaj petas ĉiujn sekciestrojn kaj reprezentantojn sendi informojn pri membronombro, vivo kaj agado en rilato kun instruado de Esperanto en ilia lando. Dankon!

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

La ĉefredaktoro Jozefo Nemeth diligente preparas la numerojn de IPR. La revuo strebas koncerni ĉiujn gravajn por ILEI temojn, meti la plej aktualajn informojn pri funkciado de la Ligo kaj pri pedagogio ĝenerale. Intensa kunlaboro okazas inter J. Nemeth kiel redaktoro kaj M. Grosjean en tre serena kaj efika etoso.

Juna Amiko (JA)

Poiome daŭras la esploro pri reformigo de la revuo. En la numero 4 por 2018 aperis enketo pri la uzo de JA en instruado de Esperanto. Pri tio delonge diskutis la Estraro kaj nun la esploro komenciĝis. La Estraro arde petas ĉiujn kontribui al plua evoluo de nia kara revuo, nia "juvelo" – helpanto en la uzo de Esperanto inter komencantoj kaj ne nur!

ILEI en la Reto

ILEI sinsekve prezentas sin en diversaj retaj spacoj: *Esperanto + Edukado ILEI* kaj *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* estas du paĝoj en Facebook. Ĉiuj povas legi tie freŝajn kaj aktualajn novaĵojn pri la ĉiutaga vivo de la Ligo.

La Revuo ESPERANTO de UEA malfermas siajn paĝojn al novaĵoj de ILEI malavare.

Kunlaboro kun UEA

Ekvigliĝis la komuna esploro UEA-ILEI pri Eo-centroj. Post la elekto de la nova Estraro, al tiu-ĉi laborgrupo aldoniĝis la nova estraranino Yuro Jung "Unika", kiu teknike prizorgos la retejon. La laboro survojas.

Estas planata alia komuna iniciato inter la du organizoj:

Dum sia restado en Kotonuo la Prezidantino Mireille Grosjean ricevis la lernolibron de Nino Vessella pri Eo en la suahila, unua eldono de 1983. La partoprenintoj de la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto en Bunda, Tanzanio, en 2018, esprimis la deziron, ke oni represu tiun verkon. Sciendas, ke tiu lingvo estas uzata en DR Kongo, Ugando, Ruando, Burundo, Kenio kaj Tanzanio. Mireille Grosjean estas en rilato kun Renato Corsetti kaj Stefan MacGill pri tio. Privatulo konsentis subteni la represadon. Pro la 7-a AKE, kiu okazos en Bujumburo, Burundo, fine de 2019, la Prezidantino proponis, ke presado okazu en Burundo. La eldonantoj estu UEA kaj ILEI. Provlegado okazos fare de du denaskuloj de la suahila.

TEJO, UEA kaj ILEI bone kunlaboris decembre ĉe la sidejo de UNESKO en Parizo okaze de la Konferenco de la NRO-j.

Salutmesaĝoj de la prezidanto de ILEI iris al:

Sesa Eo-semajna kaj dek jaroj de Eo-instruado en Baiyangshujie, Ĉinio.

Tutnacia Kongreso de Meksiko

Kvin jaroj de laboro en la Eo Muzeo en Zaozhuang, Ĉinio

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

Tra la kanaloj de ILEI estis anoncita la nova konkurso "**Poezio tut'libera**". Ĝi akceptos poemojn en Esperanto same kiel en la pasinta jaro. Ĝi celas junulojn ĝis la aĝo 25.

Estas traktata la demando pri membreco de ILEI en la **novjorka Komitato en CELL** (Committee on Education, Learning and Literacy) de **Unuiĝintaj Nacioj**. Tiu membreco, sendube, havos bonan sencon por la Ligo.

Daŭras kunlaboro de ILEI kaj ĝiaj membroj kun la trimonata Inform-bulteno de la belga **AEDE**-sekcio (*Association Européenne Des Enseignants – Eŭropa Asocio de la Instruistoj*). Danke al tio la legantoj de la bulteno jam povis ekscii pri instruado de sciencoj el diversaj eŭropaj landoj. Komence de januaro la Prezidanto Mireille Grosjean sendis novan alvokon al sekciestroj, ILEI-reprezentantoj kaj ĉiuj Eo-instruistoj por verki materialojn pri instruado por la bulteno. La estrarano pri kongresoj Radojica Petroviĉ kunlabore kun li faras paŝojn por disvatigi la informon pri la ĉi-jara ILEI-kongreso inter AEDE-anoj kaj motivi ilian partoprenon kaj tiel malfermi la kongreson kaj ILEI al la instruistaj rondoj ekster Esperantujo. La Estraro de ILEI invitas ILEI-sekciojn kaj aktivulojn iniciati kaj flegi kunlaboron kun AEDE-sekcioj en siaj landoj. Tiu kunlaboro, sendube, bone ilustras valoron de Esperanto-komunumo kaj ĝiaj organizoj en internaciaj kontaktoj.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn kaj sincerajn bondezirojn por la Nova Jaro 2019!

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2019-01-15

Informaĵoj

- **Internacia Infana Kongreseto**

IJK, la Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto dum UK, atendas infanojn kaj junulojn

Vidu retejon: bertosch.free.fr/iik2019

Vidu fotojn de la IJK-ejo: <http://bertosch.free.fr/iik2019/fotoj.htm>

Ni serĉas novajn gvidantojn, ekzemple junan skolton aŭ sportintstruiston

Si vi gepatroj ne iros al UK, sed viaj gefiloj volus iri al IJK, tiam ni provos organizi, ke alia e-isto el via lando akompanos viajn gefilojn al Lahti

Se la dato en julio ne taŭgas, venu aŭguste al infana-familia renkonto en Francio gresillon.org/s4

Salutas la teamo de IJK 2019 Skribu al: infana.kongreseto@gmail.com



- En la kerno de esperantismo estas, aŭ devus esti, certa grado de sennaciismo kaj de internacia frateco. Ja Zamenhof predikis: Kun internacia lingvo, “ĉiuj nacioj estus unuiĝintaj en komuna frateco”. Nu, Esperanto ankoraŭ estas for de tutmonda unuanimeco. Ĉu tio estus kialo por teorie klarigi la jam kelkjaran krizon de enmigrado en Eŭropo? Ĉu nur kiam la homaro vere rekonos sin loĝanta sur la sama tero, kaj vojaĝantaj sur la sama ŝipo, ili povus fariĝi pli fratecaj?

Naivecon for, fakto estas ke popoloj de ĉiam pilgrime migradis, temas pri la homa karaktero, bazita sur la fakto ke ni atingis ĉiujn partetojn de la mondo. Sed kelkaj — sen agnoski sian evidentan rasismon — asertas tamen ke kelkaj enmigrintoj estas pli bonvenaj ol aliaj. Ekde 1993, la kontraŭrasisma reto UNITED kolektas datumojn pri viktimoj de migrado. La listo enhavas 4 500 okazaĵojn. Klára Ertl, kiu volontule laboras pri

ĝi, asertas: ne temas pri krizo de enmigrado, sed jes krizo de solidareco.

La landlimoj estas unu el la plej abstraktaj homaj kreitaĵoj. Rilate al migrado, sendube ekzistas gravaj politikaj demandoj, sed ili neniam pravigus ŝovinismajn atakojn, precipe en landoj, kiuj formiĝis danke al enmigrado, kiel Usono aŭ Brazilo. Dum la homoj dividos

sin per sociaj klasoj, religioj kaj nacioj, ili plu timos ĉion fremdan.

Ankaŭ en Esperantujo estas krizoj, sed ĉu ne la esperantistoj estas tiuj homoj, kiuj ĉiam ilin defias? Nia intervjuo gastas, Suso Moinhos, dediĉas sin al fako en nia kulturo, kiu eble estas la plej defia, speciale en la nunaj tempoj: Literaturo. Malgraŭ tio, li plu verkas kaj tradukas.

Same ni, en Kontakto plu laboros por vi! Jam la dua sinsekva eldono, en kiuj ni ĉefteme parolas pri grava temo — el homa kaj politika vidpunktoj. Ja Kontakto estas soci-kultura revuo — kaj ne nur por junuloj. Kiel vi scias, tio ne signifas ke ni havas pli distrajn erojn (kiuj ege mojosas). Tio estas pruvo, ke juneca revuo povas esti kaj serioza kaj amuza. Jam venis fino de unu plia jaro. Dankon al vi, kiu akompanis nin en 2018. Aplauĉojn al

niaj kunlaborantoj, kiuj per riĉa enhavo regalas nin! Mi esperas ke vi ne forgesu reaboni la revuon por la sekva jaro! Ĝis!

La elŝutado de tiu ĉi numero eblas nur por abonantoj. Se vi ankoraŭ ne estas abonanto, vi povas tuj aboni ĝin per reta abonilo. Por elŝuti retan *Kontakto* vizutu: uea.org/revuoj/
Agrablan legadon, Rogener Pavinski, Redaktoro de *Kontakto*

- Yevgeniya Amis

Informilo por Interlingvistoj (IpI): nova numero (106) | Information for Interlinguists (IfI): new issue (06)

Karaj abonantoj / kunlaborantoj,

La novaj eldonoj de IpI (Informilo por Interlingvistoj, 106) kaj IfI (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists, 06) haveblas rete:

IpI (Esperante):

Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/12/IpI_106_Final.pdf

Pli fruaj numeroj: <http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/>

IfI (angle):

Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/12/IfI_106_Final.pdf

Pli fruaj numeroj:

<http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). IpI kaj ĝia anglalingva eldono (IfI) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj.

La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 28a de februaro 2019. Dankon!

Amike, La redakcio (Humphrey Tonkin, Ĵenja Amis, Angela Tellier) ipi@esperantic.org

- Berto Ŝuman

Baldaŭ komenciĝos la franca konkurso 2019 de "Poésie en liberté" (Poezio tut'libera), duafoje malfermata al poemoj en Esperanto.

En 2018, 48 junuloj el la tuta mondo partoprenis la konkurson esperantlingve.

La konkurso 2018 finiĝis kun 2 belaj vesperoj en Parizo la 22-an kaj 23-an de novembro.

Ĉi-sube, vi povas vidi (dum la ceremonio de la 22-a de novembro 2018) :

maldekstre : Eva Pechova ricevas la 3-an premion el manoj de Petr Dulak, Ambasadoro de Ĉeĥio en Francio

dekstre : Ingrid Berglund ricevas la 1-an premion el manoj de Didier Loison, vic-prezidanto de Esperanto-France

(pliaj fotoj videblaj ĉe www.poesie-en-liberte.fr)

Alkroĉite la regularo (esperantlingve) por la konkurso 2019. Mi tre ŝatus ke vi helpu konigi ilin.

Amike, Gilles Tabard <gilles.tabard@gmail.com> Komitatano de Espéranto-France Vic-prezidanto de Poésie en liberté

- Novaĵoj el Pollando

Dr. ESPERANTO.
—
J Ę Z Y K
MIĘDZYNARODOWY.

PRZEDMOWA
i
PODRĘCZNIK KOMPLETNY.

por Pol., o. J

Aby język stał się powszechnym,
nie wystarczy nazwać go takim.



Cena kop. 15.

WARSZAWA.
DRUK. I LIT. CH. KELTERA, UL. NOWOLIPIE № 11.
1887.

ДОЗВОЛЕНО ЦЕНЗУРОЮ
Варшава 9 июля 1887 года.

Jezyk międzynarodowy, jak każdy narodowy, jest własnością ogółu;
autor zrzeka się na zawsze wszelkich praw osobistych do niego.



En Pollando

- INFORMITALE 232
Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio

Kial diable mi devus iri al Triesto por partopreni la Italan Esperanto-kongreson?

Ni komencu de la komenco. En venonta aŭgusto de la 24-a ĝis la 31-a okazos la kutima internacia Itala Kongreso de Esperanto en Triesto, <https://kongreso2019.Esperanto.it/86/>.

Se vi konas la koncepton Meza Europo/Mitteleuropa, vi devus iri pro tio, ĉar Triesto estis la plej okcidenta urbo de tiu regiono kaj la aŭstra imperiestro estas ankoraŭ rigardata same ame kiel oni rigardas al la propra avo. 50 jaroj da itala regado nur sukcesis komprenigi, ke estis io tre bona en la malnova mezeuropa ordo.

Sed se vi ŝatas la novan koncepton pri Europa Unio, vi devos partopreni tiun kongreson ankaŭ pro tio, ĉar tie vi renkontos la estrojn de Europa Esperanto Unio, kiuj prelegos pri pluraj aspektoj de la nuna europunia situacio fronte al la nova mondo regata de grandaj potencaj landoj, ĉe kiuj EU devas aserti sin. Tute aparte unu evento traktos la eŭropan politikon pri instruado de fremdaj lingvoj en la ŝtatoj de EU. Ĉu estos pli bona okazo por starigi komunan strategion por Esperanto en EU?

Evidente vi havos problemon elekti viziti la kongresan urbon mem aŭ partopreni la ekksursojn, kiuj portos vin ankaŭ al Slovenujo. Bonvolu rigardi ĉi tiun paĝon por konstati la malfacilaĵojn de la elekto: <https://kongreso2019.Esperanto.it/ekskursoj/>.

Tamen ne pensu tro multe! Regalu vin per la internacia Itala kongreso: <https://kongreso2019.Esperanto.it/aliĝilo/>

La LKK

- **Sen Nacia Asocio Tutmonda**

Mi skribas ĉi tiun mesaĝon al vi nome de la OKK de la [venonta SAT-Kongreso](#), kiu okazos en Barcelono de la 4a ĝis la 11a Aŭgusto.

Viaj tujaj aliĝoj kaj loĝ/manĝ antaŭmendoj tre helpas al la ĝenerala organizado, ĉar oni devas fari sufiĉe grandan antaŭpagon por la kongresejo ĉi-monate. Jam aliĝis 43 homoj kaj ni esperas, ke multaj el vi tion faros tre baldaŭ. Memoru ke post la 15-a de januaro la kotizo iom altiĝas. Niaflanke, ni daŭre kaj zorge pretigas buntan kaj engaĝintan programon por vi.

Se vi havas dubojn aŭ komentojn prie ne hezitu skribi min. Fortan brakumon al ĉiuj, Saioa.

- **Eŭropa Asocio de la Instruistoj**

Mi esperas ke en 2019, multaj el vi, denove konsentos laŭeble kunlabori por havigi informojn pri la instruado por la trimonata Inform-bulteno de la belga AEDE-sekcio (*Association Européenne Des Enseignants – Eŭropa Asocio de la Instruistoj*).

Ĉar ŝi estas tre kontenta pri tia bonega kunlaboro, la redaktistino havas jenan sugeston por la jan.-febr.-marta bulteno : *la studoj por la formado de instruistoj por elementaj lernejoj (6-12 j.), mezgradaj lernejoj (12/13-15 j.), liceoj (15/16-18 j.)* ... sen tro da detaloj!

- Kondiĉoj por esti akceptataj : laŭ diplomo? post ekzameno?
- Kie : universitato, supera instituto? dum kiom da tempo?
- Elementoj : ĉefe fakoj aŭ pedagogio?
- Ĉu la psikologio de infanoj, de adoleskantoj, la grupa dinamiko, la mastrumado de konfliktoj, la antaŭzorgo, aŭ la strebo kontraŭ nuntempaj temoj, ekzemple la persekutado aŭ la toksomanio, estas parto de baza trejnado aŭ nur proponitaj en daŭra edukado aŭ moduloj? Laŭ staĝoj surloke kaj kiam dum la studoj?

La "preferinda" limdato por la sendo de tiaj informoj estus la 20-a de februaro (plej malfrue la 5-an de marto).

Antaŭdankon pro eventuala transsendo de tiu peto al gekolegoj, kiuj pretus kunlabori.

Kore via, Germain Pirlot

- **INFORMITALE 233**
Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio

Ne ŝtelu mian revon pri Eŭropo - Itala Esperanto-kongreso, Triesto
24–31-a de aŭgusto 2019

Jam pli ol unu generacio de eŭropanoj revas pri unuiĝinta Eŭropo, forta kaj modelo de socia justeco por la cetera mondo. Bedaŭrinde oni provas ŝteli nian revon, inkluzive de tiu de la esperantistoj, kiuj multe esperis pri Eŭropo kaj lingva kultura egaleco. Se vi ankoraŭ esperas, vi devas partopreni la Italan Esperanto-Kongreson, <https://kongreso2019.Esperanto.it/eo/>, en Triesto, kie okazos ankaŭ la jarkunveno de Eŭropa Esperanto-Unio. Vi tiam povos ĉeesti la kunvenon de EEU pri: Multlingva politiko de EU en lernejoj, aŭ la prelegon de Sean O' Riain: "Irlandaj spertoj de lernado de dua lingvo en bazaj lernejoj ekde 1922: kiel plibonigi la rezultojn?" kaj de Jozefo Reinart: "Manlibro de multdisciplina projekto: Movebleco kaj inkluzivo en multlingva Eŭropo" kaj krome de Zlatko Tisljar: "Rezultoj de la projekto Multlingva Akcelilo (kiun financas Europa Komisiono)" kaj de Angela Tellier (aŭ Tim Morley) "Eksperimento uzi Esperanton en britaj lernejoj cele al ties propedeŭtika funkcio".

Ĉu tio sufiĉas por konvinki vin partopreni kaj plurevi pri Eŭropo? Simple iru al <https://kongreso2019.Esperanto.it/eo/> kaj aliĝu. Bonvenon! La LKK

Leteroj

- **Françoise Noireau**

Dankon! Iam mi ŝatus vojaĝi al via lando kaj ekkoni vin, kiu redaktas tian belan bultenon!

- Dankon pro ĝi. Por la estonta korespondado, ĉu vi povus sendi ĝin samtempe al mia privata retadreso lunazzi@Esperanto.cc? Mi gratulas kaj salutas la albanan e-movadon. Eĉ se mankas al mi tempon por legi, mi legis la plej parton. Interesa,

Unu komento permesu min pri "Albanio- Aglino- la plej pratempa simbolo de kredo en Eŭro-Azio Fatbadha Demi". Mi tre ŝatis la artikolon, sed volas komenti pri la uzado de manoj, kio la aŭtorino agnoskas al reprezentado de aglio. Fakte, povas esti tion sed bone estus ke ŝi montrus pli da ekzemploj, ĉar ŝajnas min esti trompa la foton de la Papo vokante aglion, laŭ mi li volus signifi kolombon, simbolo pri paco. Alia besto reprezentita tiel estas la papiliono.

Kiam mi revidis la aglion riprezentita en la meksika flago, kie ĝi mortigas serpenton, mi perceptis que ĝi estus simbolo de la hispana imperio mortigante la aztekan, ĉar ili havus la serpenton kiel propran kaj dian simbolon.

Krome, laŭ mi, la artikolo devus finiĝi montrante la plej aktualan uzadon de la simbolo de aglio:

Verdstele, Jozefo Prof. José J. Lunazzi Instituto de Física UNICAMP lunazzi@ifi.unicamp.br

www.ifi.unicamp.br/~lunazzi Tel. 19-3521-2451

- **Renato Corsetti**

Dankon, Bardhyl, pro via bulteno, kiu ĉiufoje estas nova libro.

Amike, Renato

- **Gafur Mirzo**

Estimata,

Mi bonorde ricevis Vian richenhavan Bultenon nr 140 kaj mi nun plezure tralegos ghin. Koran dankon kaj pliajn sukcesojn je via agado. Amike kaj altestime Gafur

- **Françoise Noireau**

Dankon! Iam mi ŝatus vojaĝi al via lando kaj ekkoni vin, kiu redaktas tian belan bultenon!

- **Raymonde Coquisart**

DANKON !!!!

- **Augustin KAKOZWA**

Saluton kara,

Mi estas dankema kaj ĝoja ricevante la senditan bultenon pri Albana movadoj, bedaŭrinde vi daŭre silentis por retumi al mi, mi ja sentas ke vi estis okupita kaj ne povis ĉion plenumi.

Mi ankaŭ sendis al vi fotojn pri miaj instrulaboroj, bedaŭrinde nenie kaj al neniu mi povas espri subtenon pri tiaj movadoj miaj tie ĉi en Goma urbo en Respubliko Demokrata Kongo.

Mi ĝojos se iam vi pretus klopodi por ke mi ankaŭ havu subtenon,se via asocio subtenus mi dankos. Amike Augustin

PS: Se vi estas katolikaj aŭ kristanoj mi deziras al vi prosperan Adventan periodon.



Augustin KAKOZWA

Saluton Kara,

Mi estas dankema kaj ĝoja ricevante la senditan bultenon pri Albana movadoj,bedaŭrinde vi daŭre silentis por retumi al mi,mi ja sentas ke vi estis okupita kaj ne povis ĉion plenumi.

Mi ankaŭ sendis al vi fotojn pri miaj instrulaboroj,bedaŭrinde nenie kaj al neniu mi povas espri subtenon pri tiaj movadoj miaj tie ĉi en Goma urbo en Respubliko Demokrata Kongo.

Mi ĝojos se iam vi pretus klopodi por ke mi ankaŭ havu subtenon,se via asocio subtenus mi dankos.

Amike Augustin

PS: Se vi estas katolikaj aŭ kristanaj mi deziras al vi prosperan Adventan periodon.



- **Edmond Ludwig** <Esperanto.eludwig@orange.fr>

Jam mi legis kun granda intereso vian esperantistan vivhistorion! Vian agademon mi admiras kaj mi vian agadon admiras ankoraŭ pli pro la fakto, ke mi konas la malfacilaĵojn, kiujn vi havis en via lando!

Plej amike! E.L.

- Mi legis ke albanoj fakte estas du etnoj: norde gegoj, sude toskoj. Bonvolu respondi, ĉu vi estas gego aŭ tosko? Sergeo

Respondo:

Kara Sergej, ekzistas nur unu etno albana, simile al unu etno rusa. Ekzistas du ĉefaj dialektoj, gega supre de rivero Shkumbin, inkluzive Kosovon kaj parton de Makedonio.

Toska, malsupre de rivero Shkumbin, inkluzive de nord-okcidenta Grekio kaj parte Makedonio.

Tamen la dialektoj ne estas tro diferencaj, almenaŭ ne pli ol ni diru en Suda kaj Norda Italio, en Britio kaj Usono por la angla, en Ukrainio kaj Rusio por la rusa..

Krom la dialektoj, diversaj distriktoj en Albanio, Kosovo aŭ Makedonio havas ankaŭ specifajn kulturajn karakterizaĵojn, simile kiel en la ceteraj landoj. Serbojn por humiligi albanojn de Kosovo, nomas ilin 'ŝkiptaroj' dum albanojn de Albanio nomas 'albanskij'. Ankaŭ albanoj moknomas serbojn per vorto 'ŝkije', kiel rusoj moknomas germanojn per vorto 'njemci'... Al kiu apartenas mi? Certe al gegoj. Sed post la jaro 1972 ĉiuj reprezentantoj de albanoj en Balkanio aprobis standardan literaturan lingvon, kion oni aplikas en la lernejoj, en la preso, en la oficejoj, en la armeo, en la polico ks. Tio reduktigis lingvajn diferencojn kaj dialektojn mem. Puŝkin kreis literaturan rusan, kiel Dante literaturan italan. Tial la nuna albana estas unuiga etna faktoro.

Kelkaj homoj misinterpretas kaj misuzas la vorton 'raso'. Fakte en la mondo ekzistas nur tri rasoj. Albanoj kaj rusoj apartenas al sama raso, blanka kaj kun ĉiuj mondaj popoloj al homa specio...Dankon pro la demando, ĝis Bardhyl

- Koran dankon por la bulteno.

Ĝi estas kvazaŭ 'libro', tre granda kaj enhavo-riĉa! Kaj el ĝi mi jam elprenis kelkajn tre utilajn bildojn por mia Esperanto-kurso. Kaj ankaŭ la proverboj albanaj tre interesas min.

Koran dankon~Sincere via BAK Giwan

- Mi decidis sendi al vi kelkajn miajn aforismojn. Ili entute estas pli ol mil. Kelkaj el ili estas tradukitaj de mi el la uzbeka kaj ceteraj estas originalaj kiujn verkis mi mem. Uzbekaj proverboj estas tre multaj (pli ol dek mil). Dum la tradukado inspirinte mi verkis ankau kelkajn originalajn. Vi povas uzi ilin en via bulteno. Mi rimarkis ke vi ofte uzas proverbojn en via revuo. Kaj pro tio mi decidis sendi al vi ankau el mia kolekto. Bondezire kaj altestime Gafur Mirzo, UZBEKIO
- Mi unue salutas vin!
Antaulonge ,mi konceptis ideon krei turisman grupon tra la mondo. Nu,jen hungara amiko nomita PAVEL KONAKOV kiu ĵus kreis telegraman konton perkoresponde. Tiu adresgrupo permesas nin bone interŝanĝi diversajn ideojn pri ekoturismo.
Bone: Aliĝu al tiu telegramo- ligilo nia celo estas krei turisman grupon; estos punktoj de Ljubogost en la tuta mondo kie niaj turistoj povos ripozi, amuziĝi kaj lerni naturon, senti ĝin,..... Ni interesu dinamikajn aktivulojn por atingi nian celon.
https://t.me/joinchat/BtcMP1NngYQP_k4WUABTTw
Pliaj informoj, informu vin al la jena retadreso: pavelkonakov@mail.ru
Vi mem sentu ke iafoje membriĝas, estos en la ronda familio. Fartu bonege!
Bonvenon al nia turisma grupo!
Plej amike Honore Sebuĥoro honsebn@gmail.com
- Mi tre dankas vian afablecon sendi al mi vian bultenon. Vi tre diligente laboras, entuziasme verkas. Mi preskau sentas min maldiligenta. Tamen nia kurso ankau kreskas, kaj la gekursanoj evoluas, kaj mi estas fiera pri tio. Vi iom miskomprenis min, kiam mi demandis pri "Avo Frosto". Tio koncernas ne religion, sed la infanojn.

Lau la homa historio vivis en la dua (?) jarcento riĉa homo, kiu vidante la mizerajn infanojn, kaŝe donacis al ili dolĉaĵon. Oni multe poste opiniis ke li iĝu sanktulo, kaj ĉar li nomiĝis Nikolao, kaj en la kalendaro estas nomtago de Nikolao la 6-an de decembro, tial ankau ĉe ni (kaj en multaj landoj) Tiam "venas" la (hungarlingve Mikulás) Esperante Avo Frosto, au sankta Nikolao La infanoj purigas la botetojn pretigante al li, kaj la 5-an de decembro vespere metas al iu loko ĝin. Kaj la 6-an matene rigardas la botetojn ĉu estas ene dolĉaĵo. Mi deziras al vi ĉion bonan. Júlia

- Dankon pro tuta sendita de vi informo pri Albanio. Sendube, persone por mi, estas interesa ĝi. Mi faris kalamburon, per kiu eblas reklami turismon al Abanio Venu Albanujen, kara, al banujo mara! Mi pensas ke ĉi tie estas nenio ofenda. Sendube en Albanio estas aliaj vidindaĵoj, vizitindaj vizitendaj lokoj, sed unua-vice vi, albanoj akcentu al la maro, kaj al via naturo, lagoj, riveroj, montoj, promenadoj, vojaĝoj en naturo. Eble ni iam tamen vizitos Albanion ĝis nun ni havas kiel rezervitan planon: Montenegro + Norda Albanio aŭ Albanio suda (Sarand, Ksamil)+Korfu(Kerkira) Sergeo
- Saluton, amiko Bardhyl, koran dankon pro via Bulteno! Tre bele! Ĉu mi povas uzi ĝin?

Amike Vera

- **Korespondo kun Alan Kovaĉ**

-Hola Alan, mi ĵus tralegis vian detalan vivpriskribon kaj veron dirante mi estis ege surprizita: pro via sincereco, pro via universaleco, pro via volontuleco.

Ĝuste tiu lasta pli atentigis min. Delonge mi enesperantigis romanon de Adem Demaĉi, laŭreato de porpaca premio Sahxarov el 1991, Mandelo de Kosovo, suferinta en prizonoj jugoslavaj en Kroatio (pro tio akirinta ankaŭ kroatan civitanecon antaŭ dek jaroj), jam forpasinta julie 2018. La romano titolitas "Patrino Shega kaj kvin knabinoj" kaj temas pri rezistado de popolo albana en Kosovo dum lasta milito tie 1998-1999. Mi intencas eldoni la libron sed ankoraŭ mi ne trovis volontulan provleganton. Se vi helpus min ĉirilate mi kaj ne nur mi estus ege dankemaj! Mi kunsendas la tekston de romano, same ankaŭ mian biografion.

Ĉion bonan al vi!

Ĉu vi permesas ke ni publikigu vian mesaĝon kaj aldonon en nia Bulteno dumonata surreta, kies baldaŭa numero aperos frudecembre? Ĝis Bardhyl

Tel Viber plus whatsapp 00355 68 25 80 758

- Elkoran dankon kara Alan. Mi tre ĝojas ke vi reagis ne nur rapide sed longe kaj atenteme. Mi esperas vere je nia kunlaboro kaj amikeco. Ĉu indas precizigi mian peton al vi?

Do, vi estas petata ne nur tralegi la romanon de Demaĉi Patrino Shega kaj kvin knabinoj sed ankaŭ polurigi ĝin, pir ke la Esperanto lingvaĵo estu bonnivela, do pli alta ol jam prezentita de mi. Ĉu vi pretas fari tion?

Tuj poste mi proponas al iu eldonejo en Tirana presigi ĝin. Dume ekde pluraj monatoj alia romano de Adem estas polurata en Kubo de Vilhelmo Lutermano. Ĝi estas la unua romano de Adem el 1958 jaro. Temas pri Sangovenĝaj Serpentoj.

Se ni sukcesos eldoni alenaŭ ĉi du romanojn, la unuan kaj pli malfruan, estus ia kvitigo al tiu granda homo kiu forpasis lastan julion en Prishtina.

Mi konas lin ekde 1991 jaro, kiam li regule vizitis mian patrinon, unu el liaj unuaj instruistinoj en albanlingva lernejo en Prushtina 1942-1943.

Ni restu en kontakto. Demandu min pri ĉio ne klara en la teksto. Antaŭdankon, Bardhyl

- Vi vere rapide reagas kara Bardhyl ! Imponas al mi ke Vi persone konas tiun grandan homon kaj ke ankauh Via patrino havis ligon kun li !

Ĉu la romano havas 64 paghojn? Kioma estas disponebla tempo por poluri ghin ?

P. S. Ankauh mi ŝatus esti en kontakto kun Vi en la cetero, ĉar sindediĉaj esperantistoj ĉiam impresas min !

- Mi nur nun povis vidi Viajn aldonajhojn. Mi dankas pro ili. Mi trovas ilin ege interesaj. Por momento mi nur suprajhe trarigardis kaj parte tralegis tiujn tekstojn, sed mi certe atente tralegos la tuton je la unua konvena okazo.

Rilate al la lektorado, mi povas afirmi ke temas pri aktiveco kiun mi ŝatas. Mi jam plurfoje lektoris dum mia ghisnuna vivo : 1. mi lektoris tekstojn por la revuo " Pravnik " (Juristo), eldonatan en Zagrebo.

2. Same pri la revuo " Solidarnost " (Solidareco) kiu estis eldonata fare de la Internacia studenta klubo de amikeco. 3. En Antverpeno kiam mi estis tie mi lektoris aŭh kunlektoris tekstojn por la internacia esperanta magazino sendependa " Monato " kies kunlaboranto Vi estis / estas. 4. Mi lektoris la esperantan tradukon de Henrie Castiau (tre bona kaj sindediĉa belgia esperantisto, bedaurinde jam delonge forpasinta) de la romano " La vualo de l'silento " (traduko el la franca). Mi faris tion kune kun la tre pedanta germania esperantistino. Mi ankauh estas lingva perfektemulo.

Cetere mi trovis unuavide iom da ortografiaj aŭh gramatikaj aŭh foje stilaj korektendajhoj en la tekstoj kiujn Vi sendis al mi.

Kiel eksjugoslaviano kun politika " pedigree " mi nature ne nur auhdis, sed ankauh bone sciis pri Adem Demaĉi (pardonu pro la slava latinalfabeta supersignita litero, ĉar je klavaro kiun mi momente uzas mi ne havas la necesan literon). Eĉ ŝajnas al mi ke mi vidis lin - mi estis membro de la kroata subkomitato de la jugoslavia helsinkia komitato kaj ni pledis por li perletere kaj ghenerale rilatis al li kiel al kosova Mandela. Ĉiukaze mi alte aprezas lian agadon kaj lian tutan vivon.

Mi devus ankorauh konsideri ĉu mi povus lektori la tekston nun el tempa vidpunkto !

Kiom da paghoj lektorendaj estas entute ?

Sincerajn kaj amikajn salutojn sendas al Vi Alan Neven

P. S. Mi tre simpatias la albanan popolon. Vi scias ke ghenerale kroatoj kaj albanoj simpatias unuj la aliajn kaj ke iliaj respektivaj elmigrintoj bone kunlaboris dum la tempo de la komuna ŝtato. Stjepan Radić, nia plej granda politika figuro de la unua duono de la dudeka jarcento publike pledis por la rajtoj de la " arnautoj " (tiel oni nomis kosovajn albanojn en tempo de la reghlando) kaj plendis pro ner respekto de iliaj rajtoj. Tion li faris ankauh en la beograda asembleo (parlamento de la Reghlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj). Mi mem iomete lernis la albanan kiam mi soldatservis, kvankam mi ne menciis tion en mia trarigardo de " tuŝitaj "

lingvoj, ĉar en mia taĉmento estis 7 albanoj, 6 makedonoj, 5 slovenoj, 2 kroatoj kaj nur unu serbo. Ni ankauh regule ricevadis " Rilindja " kaj mi kapablis kompreni titolojn ĉar mi ellernis albanlingvan politikan terminologion kiel kryetari, kryesia, komiteti krajninoj ktp.

- Mi inklinas akcepti. Mi planas iri dum la resto de tiu ĉi monato en iun termalan banejon kun la ideo ne nur bani min kaj ripozi sin, sed ankauh labori je komputilo sendante grandan kvanton de sendaĵoj. Tio estas mia prioritato, ĉar tio estas ligita kun jarŝandaj tagoj kaj planado por la sekva jaro. Espereble mi havos tie ankauh sufiĉe da tempo por tie tralabori la tekston, respektive la tradukon.

Rilate al la albanlingva originalo, respektive la eble kaj potencie utila komparado de la originalo kaj de la traduko, tion mi bedaŭrinde ne kapablas fari pro mia tro supraĵa kono de nge ŝĉipe. Sed mi havas amikon kiu estas albanologo kaj kiun ankauh Vi eble konas ĉar li dum multaj jaroj estis la konstanta kongresa sekretario de UEA, nome Nikola Raŝić.

Ĉu Vi pensis eble pri li, ĉar li certe povus esti tre utila ?

Amike Alan

- Kara, mi bondeziras al vi agrablan

pasigon en la termobanejo. Bonŝance vi ankauh vin okupos per provlegado

- Mi estas Mikaelo Lineckij, nova redaktoro de "Israela esperantisto". Amri Wandel transdonis al mi Vian atikolon pri "Postkomunisma Albanio". Vi ĝin finverkis la 10.02.2017, 4 monatojn antaŭ la ĝenerala balotado.

Probablas aperigo de la artikolo en la printempa numeo de IE. Sed por ajna okazo mi petas Vin kelklinie priskribi la situacion en Albanio post la balotado.

Antaŭdankon! Amike, Mikaelo

P.S. Antaŭ pli ol 12 jaroj mi partoprenis en aranĝo, okazinta en Strasburgo, kaj tie konatiĝis kun albana esperantisto, ŝajne lia nomo estis Artur. Eble Vi konas lin, ĉu?

- Dankon pro viaj multaj informiloj, kiujn ĝis nun mi nur parte kapablis legi. Mi dubas, ĉu la multaj albanoj, kiuj loĝas en Germanio, agas tiel aktive kiel tiuj en Vieno. En Bonn almenaŭ mi nenion aŭdis pri albana grupo. Mi ankaŭ kredas, ke ĉi-tie ni havas pli da albanoj el Kosovo ol el Albanio mem.

Mi ja estas malrapida legantino kaj nur ĉi-semajne finis legi la interesan libron "Die Albanier. Eine Geschichte zwischen Orient und Okzident." La verkisto bonege priskribas la historion ek de antikvaj tempoj ĝis hodiaŭ. La aŭtoro estas Oliver Jens Schmitt, profesoro de historio en Sud-orienta Eŭropo, Universitato Viena.

Bedaŭrinde, mia memorkapableco fariĝis tiel malgranda, ke mi rapide forgesas multajn gravajn detalojn.

La E-o grupo Kolonjo festas hodiaŭ la Zamenhof-tagon. Ili ankaŭ invitas nin el la najbara Bonn. Membro de la Kolonja grupo, Hermann Kroppenber, estas bonega konditoristo en najbara Bensberg, en kies kafejo ni hodiaŭ festos Zamenhof kaj E-on, manĝante la bongustajn kuketojn kaj trinkante la kutiman kristnaskan varman "Glühwein".

Ĉion bonan al vi, via edzino kaj la E-istoj kiun vi renkontos en Tirana. Kore, Trude

PS. Mi esperas ke mi ĝustatempe atingos la kafejon, ĉar hodiaŭ estis granda fervoja striko, speciale en la regiono de Kolonjo.

- Gratulegon, amiko! Via Josenilton
- Koran dankonn, kara Bardhyl, pro via ampleksega bulteno: mi legos ghin iom-post-iome, ghi certe estas tre interesa.
Amike, via Elda
- La 28-an kaj 29-an de novembro en la sud-pola urbo Nowy Sącz, nia redaktoro, Katalin Kovats okazigis du publikajn informleciojn en la loka Altlernejo de Fremdaj Lingvoj. La lecionojn partoprenis cent da studentoj, kune kun pluraj instruistoj kaj gvidantoj de la koncernaj fakultatoj. La 29-an la lokanoj kune festis la sukcesan finon de sia alia ERASMUS+ projekto, kiun ili efektivigis kun la litovaj partneroj . Germain Pirlot
- Min bonorde atingis via mesagho. Por esplori la situacion rilate al la menciitaj libroj, mi devos viziti unu aŭ kelkajn bibliotekojn. Nun mankas al mi tempo por tio : mi estas plenshutita de profesia laboro. Mi esperas fari tion en dua duono de januaro post vintra feriado, se tio tauhgas al vi kaj via amiko.
Chi-novjarshanghe mi restas en Rusio, ĉar la filino venos hejmen. En Francio mi estis chijare jam 3-foje, la lastan - oficvojughe fine de septembro. Mi esperas, ke vi bonfartas kaj daubre viventuziasmas. Amike, Tatjana.
- La aliĝoj por nia intensiva E-staĝo PRINTEMPaS komenciĝis en gresillon.org/printempo. Ni revidos la talentajn instruistojn Pšemek, Christophe kaj Marion. Krome, la vetero estos certe agrabla ĉar la staĝo okazos aprilfine ĝis majkomence! Mi sendis leteron (poŝtan) al la E-instruistoj en Francujo (kies adreson mi havas!) proponante aĉetokuponon de 30€ en nia "libro-servo" (gresillon.org/libroservo) kontraŭ aliĝo de 2 lernantoj al PRINTEMPaS en 2019. Se via instrusto ne ricevis tiun leteron, do petu lin sendi al mi sian POŜTAN adreson.

Pensu aliĝi nun por esti certa ke la petita ĉambro estos disponibla! Olivier Buisson gvidos internacian grupon de migremuloj e-istaj dum nia staĝo. Via partnero ne deziranta ĉeesti E-kurson povus do akompani vin por profiti tiun aktivaĵon paralele al la staĝo PRINTEMPaS. [Vidu tiun paĝon](#). Mi antaŭĝojas partigi tiun semajnon kun vi kaj atendas viajn aliĝojn en gresillon.org/aligho Korege Ĵanik HUET-ŜUMAN

- La naskiĝtago de Zamenhof estu plena je frateco kaj amo por ĉiuj ! ĜIS ! Engjell Gusho

- La grupo uea-membroj nun estas en katastrofa stato. Ĝi devus esti diskutejo kie membroj de Universala Esperanto-Asocio povas libere diskuti aferojn de la asocio. Bedaŭrinde oni povas tie diskuti nur pri bagateloj, kaj ajna provo serioze diskuti pri la esencaj aferoj de la asocio -- kiel pri la elektoj en UEA -- estas konstante subfosataj. Temas tute klare pri intenca sabotado. Kiam la administrantoj mem aŭ ignoras, aŭ mem partoprenas, estas tempo pripensi fundamentajn ŝanĝojn. Bedaŭrinde venkas la silenta plimulto. Unu eksa administranto de uea-membroj nun proponas fermi la grupon, kvazaŭ kulpigante aliajn pro la malbona funkciado. kiam li mem serioze kontribuis al ĝi, per falsaj akuzoj de insultado ks. Li sukcesas, nur ĉar li gajnis por si decan reputacion en la movado, kaj homoj ne povas kredi kion li faras subfose, eĉ kiam ili vidas per la propraj okuloj. Tiel funkciis dum jaroj la malmunto de la movado en Britio; oni daŭre ŝajnigas, ke nenio rilatas al la kulpuloj mem, kaj finfine kulpigas aliajn. Tiel estis malmuntitaj SATeB, LEK, SOEF, EAB, esper-brit (Yahoo). Surbaze de tiuj spertoj, mi provis averti dum jardeko pri la situacio en uea-membroj, ĉar eĉ antaŭ jardeko tiu trajto estis evidenta. Pli-malpli frue aperos grupo kiu strebas savi Esperanton. Tiu ĉi grupo, nova-uea, estas provo fari ĝuste tion. Evidente la tempo ne estis matura en aprilo 2017; eble ĝi estas pli matura nun. La suban mesaĝon mi ĵus sendis al uea-membroj. Ĝi ilustras la problemon, kaj samtempe invitas al homoj aliĝi al nova-uea. Samtempe mi sendas al kelkaj kolegoj. Ek al la varbado! La ĉefa afero por diskuti dum la venontaj monatoj estas la elektoj en UEA de nova Prezidanto, nova Estraro kaj novaj Komitat-anoj. Notu la ŝanĝitan titolon en la suba fadeno en uea-membroj al 'Nova provo', kiu signis novan provon havi seriozan diskuton pri la temo, kiu same estis ruinigita kiel la malnova fadeno. En nova-uea la homoj havus la eblecon diskuti senĝene pri tiuj aferoj. Kore salutas Ian
- Mi tre dankas vian afablecon! Morgau HEA aranĝas en la centro " Zamenhof tagon " estos muziko, poemoj, prelegoj, ktp. Mi jam invitis nian grupon viziti la feston, povas esti multaj ĉeestoj. Pasintjare, kiam estis la 100 jara datreveno, estis granda ekspozicio, la Pola Instituto helpis, kaj la simila estis en Slovakio ankaŭ. Se vi bezonas ĝin, mi sendos bildojn pri ĝi. Lau mia opinio vi povos uzi ĝin, se vi ankoraŭ ne konas la materialon. Mi deziras al vi bonan sanon, kaj feliĉon al la jarfina festo! Júlia
- Koran dankon por via tuja respondo kaj atento! Ekzistas du variantoj por efektiviĝi nian planon pri la koncertoj:
 1. Ni devas vendi biletojn. Tiuokaze ni pagos de tiu sumo por organizado, reklamado, luado de koncertejoj ktp.
 2. Trovi iun sponsoron.
 Kara vi mem scias por veturigi la tutan ensemblon al fora regiono postulas grandan elspezon kaj krom tio mi devas pagi por cjiuj anoj de mia ensemblo. Ni ankauh chi tie havas sufuchan da koncertoj sed unue ni volus viziti vian landon kaj due nia prezentado estus bona propagando por sciigi kaj disvastigi Esperanton. Amike kaj altestime Gafur
- **Komento pri**
<http://esperantio.net/index.php?id=3565>
 En ĉi tiu bonintencita idearo aŭ proponaro komplete mankas la PROFESIA kaj KOMERCA aspekto (tipe esperantista, ĉar e-istoj estas sisteme kaj obstine kontra komercaj strukturoj).

Konfederacio kiel formo de renovigita kaj reformita UEA, por kiu ankaŭ mi pledas, JES, sed iu Centra Oficejo laŭ la ĝisnuna formo, sed prefere kiel komerce sendependa firmao, al kiu la estraro de tiu konfederacio NE povus dikti siajn volon kaj instrukciojn, devus pluekzisti, ne nepre nur kun esperantistoj kiel dungitoj. (Nature, universalajn kongresojn povas organizi, libroservoj povas prizorgi kaj redakti gazetojn povas iu ajn.). Necesas atentigi, ke la Libroservo de UEA bone funkcias sub la nuna gvidanto, kaj estus facilanime doni ĝin al la "respondeco" de iu(j) amatoro(j). (Sed li baldaŭ pensiiĝos kaj kiu tiam okupiĝos pri la libroservo?) La samo validas por chio alia.

Sen profesiaj kaj komercaj strukturoj (t.e. sen Centra Oficejo aŭ simila entrepreno) tia konfederacio, kiu tamen estus minimume administrenda, riskus fariĝi ĥimero. La ĉefa piliero de UEA ĉiam estis ĝia Centra Oficejo, de kio ĉio dependis kaj kiu faris la tutan laboron de UEA. Sen CO UEA estas nenio, nur platonajo. UEA devus havi plurajn tiajn oficejojn en diversaj landoj. La Landaj Asocioj estis nura ornamaĵo por demonstri, ke UEA estas tutmonda.

Vd. 10 rekomendojn sub <http://www.planlingvoj.ch/Esperanto2017.pdf>

Nature, ankaŭ tiaj novaj strukturoj ne povus garantii la sukceson. Oni ne forgesu, ke la plej multaj Landaj Asocioj estas malfortaj, kiuj estas surpaperaj, kaj verŝajne baldaŭ malaperos pro manko de membroj. Kiel mi jam ofte skribis, la malforteco de la nuntempa Esperanto-movado situas en la preskaŭ totala sensignifeco de Esperanto en la mondo. De tiu ĉi fakto dependas ĉiuj aliaj problemoj de la Esperanto-movado. Tiun ĉi simplan fakton la e-istoj rifuzas agnoski kaj kredi. aK, julio 2017 www.planlingvoj.ch

- Ĵus mi malfermis la komputilon kaj malkovris vian mesaĝon kun fotoj. Ili elradias feliĉon! Sufiĉas do, ke mi aldonu dezirojn de bona sano por la Nova Jaro. Pasigis la kristnaskajn feritagojn nia filino, sed nur kelktage, ĉar daŭre ŝi laboras en Parizo. Forpasis en la lastaj ses monatoj ses aktivaj veteranoj. Tio ja pripensigas !!! Aperis pluraj novaj parolantoj de nia lingvo, kiuj lernis rete, sed malgraŭ invitoj al kunvenojSed ni optimismu!
Ĝis! Edmond Ludwig
PS Mi nun havas la impreson, ke Francio frenezas ! Lando, kiu produktas 365 specojn de fromaĝoj, ja estas neregebla !!! Laŭdire: eldiro de Generalo De Gaulle
- Hodiaŭ en la nialanda prikultura reta revuo "Kultura.Uz" aperis artikolo subtitole "La Internacia Letertago "Novjarajn gratulojn, Samarkando!".
Rigardu la retligilon: http://kultura.uz/view_2_r_12741.html





- **PRI LA FORMIKA PROPAGANDADO DE ESPERANTO**

Kio feliĉigas nin, tio estas la superfluo. Milionoj da personoj studas kaj ĝuas la vivon per Esperanto, kies nombro da lernantoj kaj uzantoj kreskas pli kaj pli. Uzadi Esperanton estas vere feliĉige.

Hodiaŭ, la 7-a de januaro, estas 96.000.000 da retejoj en Guglo kun la nomo Esperanto. El tiu nombro kredeblas, ke almenaŭ 10.000.000 apartenas al esperantistoj. Tio estas pensiga kaj sentiga. Sed eĉ se ekzistus nur unu esperantisto en la mondo, kaj tiu esperantisto estus mi, mi ankoraŭ daŭrus en ĝia studado kaj uzado, pro la feliĉeco, kiun ĝi daŭre konsentas al mi.

Ridetu, ridu kaj ridegu en Esperanto. Plej bona propagandilo. Josenilton

- **SES HUNDOJ ATENDIS 24 HOROJN ĈE LA PORDO DE HOSPITALO SIAN MASTRON, KIU SUFERIS CVA-n (KAJ PRI LA AKADEMIO DE LA PAROLO)**
Informis Josenilton
- Mia artikolo en Off-Guardian en Esperanto <https://off-guardian.org/2018/12/30/to-whom-was-her-majesty-referring-in-her-christmas-broadcast/>
Al kiu aludis Ŝia Moŝto en sia Kristnaska elsendo?
Ian Fantom
Profesoro Carroll Quigley en sia nun fama libro 'The Anglo-American Establishment' [La Anglo-Usona Establaĵo] skribis en la Antaŭparolo de la libro, "La kapablo de angloj de tiu ĉi klaso kaj fono [la Establaĵo] lasi evidentajn nediritajn, escepte eble en nekrologoj, estas al eksterulo enigma kaj kelkfoje ĝena". Unu tia ekzemplo leviĝis en la reĝina televidelsendo al la brita nacio en Kristnaska Tago, en kiu ŝi asertis: "Eĉ kun la

plej profunde sentataj diferencoj, trakti kun respekto la alian personon kiel fratan homon estas ĉiam bone kiel unua paŝo al pli bona interkompreniĝo”.

(<http://royalcentral.co.uk/uk/thequeen/113370-113370>)

BBC raportis: “Ŝia mesaĝo venas dum la parlamento restas dividita pri la Britelira interkonsento de Theresa May, dum Britio pretiĝas por eliri EU en marto”.

(<https://www.bbc.co.uk/news/av/uk-46680354/the-queen-s-christmas-message-2018-in-full>)

The Guardian asertis: “Kun la parlamento profunde dividita pri la britelira negoco de Theresa May kaj militaj konfliktoj kiuj furoras en iuj partoj de la mondo, la vortoj de la monarĥo verŝajne resonos ĉe multaj. ... La elsendon oni registris la 12an de decembro, antaŭ la kolera kolizio inter Theresa May kaj Jeremy Corbyn en la Ĉambro de Komunumoj, en kiu la laborpartia gvidanto estis akuzita nomi Theresa May ‘stulta virino’, kion li neis”. (<https://www.theguardian.com/uk-news/2018/dec/24/queens-christmas-speech-peace-on-earth-needed-more-than-ever>)

Laŭ Daily Mirror: “Reĝino ‘sendas kaŝitan mesaĝon’ kun zorge lokita foto en sia Kristnaska Prelego”, kvankam ili ŝajne ne certis kio estis tiu mesaĝo. “Reĝaj internuloj emfazis, ke la reĝinaj vortoj absolute neniel rilatas al ŝiaj du nepoj kaj iliaj edzinoj, kaj multaj homoj kredas, ke pli verŝajne estas vualita aludo al la politika elfalaĝo kaj la Briteliro”, ili skribis. (<https://www.mirror.co.uk/news/uk-news/queen-sends-hidden-message-carefully-13774830>) Sed la ĝenerala vidpunkto en la tradiciaj amaskomunikiloj kiel raportis The Independent estis: “La reĝino vokis por tiuj kun ‘profunde sentataj diferencoj’ trakti unu alian kun respekto en afero kiun iuj vidos kiel vualitan aludon al la toksa humoro de la publika debato de post la britelira voĉdono”.

(<https://www.independent.co.uk/news/uk/home-news/queens-christmas-day-speech-christmas-brex-it-annual-a8699006.html>)

Tamen mi vidis neniujn vagantajn hordojn agresi kontraŭ la eminentulojn en la debato pri Briteliro, nomante ilin fiajn nomojn, fermante prelegojn kaj prezentojn, malebligante publikan debaton kaj ruinigante la karierojn de tiuj kies vidpunktoj pri EU ili malŝatas. Tion mi vidis rilate al aliaj aferoj, sed ne rilate al la Briteliro. Nek mi aŭdis pri interpuŝiĝoj en drinkejoj kaj aliaj publikaj lokoj dum rivalaj frakcioj celas la gorĝojn de aliaj, kiel ŝajne volis supozigi la tradiciaj amaskomunikiloj dum iom da tempo. Efektive la arda debatado estis en la parlamento, kaj en la centro de tio estis la registaro de Ŝia Moŝto. La plej malbonaj aferoj kiuj okazis tie estis la forpreno de la reĝa klabo [simbolo signanta ke la parlamenta ĉambro estas en sesio], kaj akuzo al la gvidanto de la Opozicio, ke li buŝumis la vortojn ‘Stulta virino’. La reĝina elsendo estis por la ordinaruloj, kaj inter la ordinaruloj la reago superŝute estis plua malestimo al politikistoj, el kiuj multaj ŝajnas esti lojalaj al eksteraj interesoj anstataŭ al tiuj en la elektodistriktoj kiujn ili estas supozataj reprezenti.

La ideo lasi nedirita la evidenton estas, ke ĉiuj povas interpreti la aserton en maniero kiun ili mem ŝatas, tiel alportante vastan konsenton, dum la origininto de la mesaĝo povas distancigi sin de iu ajn el tiuj interpretoj. Ni do komencu per la Briteliro.

Briteliro

Ekzistas tekniko en merkato nomata ‘konfuz-merkato’, en kiu oni donas al la publiko multajn eblecojn kaj distraĵojn, tiel ke finfine neniu vere scias kion elekti, sed la merkatoj zorge gvidas la homojn al tio kion ili ekde la komenco deziris, ke ili elektu. Vidata en tiu lumo la tuto de la britelira konfuzo dum 2018 komencas havi sencon. Dum la jaro oni konstante diris al ni kiom horore komplika estas la afero entute. Du sinsekvaj ministroj por Briteliro ekŝiĝis, ŝajne marĝenigitaj de la ĉefministro, Theresa May, dum ŝi transprenis mem la negocojn.

Kulmine de tio, Theresa May metis al la parlamento [proponitan] interkonsenton, dirante, ke tio estas la sola kiun akceptus EU, kaj ke la alternativo estus depromeni klif-randon, kun katastrofa seninterkonsenta Briteliro. Kiam evidentiĝis, ke ŝi perdis la voĉdonon ŝi nuligis ĝin, kaj reiris al EU por ‘klarigo’, petante konsilon, kiel ŝi persvadu parlamentantojn en Westminster voĉdoni por ŝia propono. Ŝi pretervivis voĉdonon de nefido ene de sia propra partio, lasante la militantajn frakciojn en plenhalto.

La fina sesio en la parlamento vere evidentiĝis tion kion ni nomas demokratio, kiam la ĉefministro ekkondukis kvazaŭ ŝi estus en kristnaska infan-pantomimo. La gvidanto de la Opozicio, Jeremy Corbyn, verŝajne pro senesperigo, elbuŝigis kelkajn vorton subvoĉe, kaj tio fariĝis la temo de unuhora parlamenta kverelo. Iuj insistis, ke li buŝumis la vortojn “Stulta virino”, kvankam kiam li revenis al la ĉambro por klarigi, li diris, ke li buŝumis la vortojn “Stultaj homoj”. En la novaĵelsendo de BBC Radio 4 tiun vesperon je la kvina horo, oni dediĉis la unuajn 17 minutojn al tiu kerna demando, el unuhora programero. La afero, kiujn vortojn Jeremy Corbyn buŝumis dominis la tuton de la britaj amaskomunikiloj dum 24 horoj, dum la parlamento disiĝis por dek-sep-taga kristnaska paŭzo. Konsiderante, ke li efektive nenion diris, iuj asertis, ke li estas akuzata de orvela pensokrimo. Kaj dum parlamentanoj kvereladis pri “afero de tiom supera malgraveco”, kiel vortumis tion George Galloway en sia programo Sputnik en RT

(<https://www.rt.com/shows/sputnik/447210-hundreds-homeless-people-britain/>),

senhejmulo mortis sur la sojlo de la parlamentejo.

La ‘Remainers’ [Restantoj: tiuj kiuj volas resti en EU] (nun nomataj ‘Remoaners’ [Reĝemuloj]) daŭre diras al ni, ke neniu voĉdonis por esti malpli bonhava, kaj do ke ni devus aŭ akcepti la negocitan interkonsenton de Theresa May aŭ okazigi duan referendumon. Iuj el ni dum la referendumo kampanjo de 2016 jam atendis duan referendumon se la elektantaro voĉdonus malĝuste, ĉar tiel funkcias la demokratio de EU. Danio voĉdonis ‘Ne’ al la aprobo de la Traktato de Maastricht en 1992, kaj poste ‘jes’ en 1993. Grekio en 2015 voĉdonis ‘Ne’ al la kondiĉoj de la kaŭcio, sed poste oni antaŭeniris ĉiukaze. Irlando en 2008 voĉdonis kontraŭ la Traktaton de Lisbono, kaj poste kiam oni diris al ili ke ili devas denove voĉdoni, ili akceptis ĝin. En 2016 Hungario voĉdonis kontraŭ la kvotojn por EU-rifuĝintoj, kun la rezulto, ke estis konstanta konflikto kun EU pri la afero. Do kion oni atendus rilate al la brita referendumo de 2016 pri membreco de EU se ni britoj atingus la malĝustan respondon?

Dua referendumo nun ŝajnas verŝajna sekvo, kaj estas intensa debato inter la Briteliremuloj pri la demando, ĉu partopreni en dua referendumo aŭ ĝin bojkoti. Unu antaŭa kampanjanto diris al mi, ke li enmetis grandegan kvankton da energio en la unuan referendumon, kaj elspezis £4000 por ĝi; nun li estos tri jarojn pli maljuna, kaj ne povos ripeti la laboron. Sur tiu bazo la Establaĵo ĉiam finfine venkos. Kaj kion atingis dua referendumo, alie ol ankoraŭ pli da konfuzo?

La lobiistoj por dua referendumo konstante diras al ni, ke neniuj voĉdonis por esti pli malriĉa. Sed ili malpravas. La brita popolo ne faris, sed iliaj reprezentantoj en la 'demokratia' EU ja faris. Tiel faris ankaŭ la homoj en Irlando kiam ili voĉdonis duan fojon pri la Traktato de Lisbono. Fundamente, la traktatoj kiuj konvertis la Eŭropan Komunumon al Eŭropa Unio pavumis la vojon al la nuna ekonomia krizo, en kiu la riĉuloj fariĝas pli riĉaj, kaj la malriĉuloj fariĝas malpli riĉaj.

* Tiom simpla kiom 123

Artikolo 123 de la Traktato de Lisbono malpermesas al iu ajn registaro en EU krei monon. (<https://eur-lex.europa.eu/LexUriServ/LexUriServ.do?uri=CELEX:12008E123:EN:HTML>) Do kiel ili kreas pli da mono por la ekonomio kiam ĝi estas bezonata? Ili devas permesi al privataj bankoj tion krei kaj poste pruntepreni de ili. Kompreneble, privataj bankoj ŝuldigas interezon, kaj do prefere ol nur ruinigi la ekonomion per enpumpado de tro da mono en la sistemon ili denove ruinigas ĝin per pago de interezo, kaj do enpumpas eĉ pli da mono el la sistemo en la bankojn.

Jeremy Corbyn, kiel gvidanto de la Laborpartio, deziris enkonduki Popolan Bankon. (<https://www.telegraph.co.uk/finance/bank-of-england/11804324/Jeremy-Corbys-Peoples-QE-would-force-Britain-into-three-year-battle-with-the-EU.html>) Tiel oni vere pritraktus la monprovizon. Sed laŭ The Daily Telegraph li ne rajtus tiel fari sen kontraŭiri Artikolon 123 de la Lisbona Traktato, kaj do puŝus Brition en trijaran batalon kontraŭ EU. Lia ideo estis, ke la Bank of England [La Banko de Anglio, tielnomata] ricevu novan mandaton per kiu ĝi povus rekte investi en la publikajn servojn. The Telegraph asertas, "Ekonomoj avertas, ke tio havus katastrofajn sekvojn. Tony Yates, eksa ekonomo de la banko kaj nun profesoro ĉe la Universitato de Birmingham, diris: 'Tiu vojo kondukas al mon-strategia ruino.' Mark Carney, la estro de la Banko, diris, ke li ne povus antaŭvidi iujn ajn cirkonstancojn' en kiuj centra banko de altnivela ekonomio devus financi registarajn deficitajn." Kaj tiel la riĉuloj fariĝas pli riĉaj kaj la malriĉuloj fariĝas pli malriĉaj.

Ekzistas lobia grupo nomata Positive Money [Pozitiva Mono], kiu kampanadis kontraŭ la sistemon kiun ni nun havas. (<https://positivemoney.org/>) Ili provis eduki la publikon pri la maniero en kiu la bankoj vere funkcias, kaj tio tre malsamas al la maniero en kiu ni ĉiuj iam pensis, ke ĝi funkcias. Mi sekvis tiun aktivecon ekde antaŭ ol ili formale fondiĝis, kaj ili faras bonegan laboron.

En Francio la Flavveŝtuloj manifestaciis pri tiu kaj rilataj aferoj. Mi trovis filmeton de

intervjuo kun unu el la Flavveŝtaj manifestaciintoj en RT France.

(<https://www.youtube.com/watch?v=8g4ur4j0YvM&t=3s>) La jenon li diris (france): “Mi ne havas rektan respondon, sed por trovi la solvon necesas identigi la problemon, kaj la problemo estas, ke la mono malaperis. Kien ĝi iris? La fakto estas, ke la mono estas tie, sed ili ŝtelas ĝin de ni ĉiuj. Ili ŝteladis ĝin de ni depost 1973, kiun la leĝo Pompidou-Giscard, kiun Giscard voĉdonigis kiam li estis ministro de Pompidou. Tiu Leĝo permesas al la registaro pruntepreni de privataj bankoj prefere ol de la Banko de Francio, kiu proponis nulan interezon. Ekde tiam ili pagadis interezon al la privataj bankoj de bankistoj. Ni estas ŝtato sub jugo de la uzuristoj”.

Demandita de kie la registaro havigus monon, li respondis: “La mono estas tie. Estas la valoro de la laboro de ĉiuj francoj. La valoro de tio kion ni produktas ĉiutage. Aŭtoj, pano, absolute ĉio. Estas miloj da laboristoj. La sistemo funkcias, escepte, ke 80% de niaj impostoj, 80% de nia provizo, estas donata al la provizo de la bankoj, por preventi ilian kolapson. Jen ĉio. Tio klarigas, kial homoj ne plu havas monon. Sed la mono estas tie”. Li diris, ke estas ankaŭ internacia problemo: “Usono jam spertis la saman aferon dum cent jaroj, ĉar ili prunteprenadis de privataj bankoj. Post tio privataj bankoj ne foriris. Tiuj estas J P Morgan, Rockefeller, The Federal Reserve de Usono, la Federacia Registaro. Tion denunciis JFK. Li ricevis kuglon pro tio. Same okazas jam en Francio”. La Traktato de Lisbono sigelas tion en la juron. Tio signifas, ke Jeremy Corbyn ne nur kontraŭirus la kutimon en Britio, establitan de gereĝoj William kaj Mary de Oranje kiam ili en 1694 donis Reĝan Ĉarton al la Banko de Anglio, privata institucio posedata de bankistoj, sed ankaŭ ke li estus tuj ĉesigita de la aŭtoritatoj de EU. Tia klaŭzo en la Traktato de Lisbono diras al ni kiuj vere regas aferojn en EU. Cui bono? [Al kiu la profito?]

* Ĝisatingi la Bronzan Epokon

Max Keiser en sia programo Keiser Report en RT dediĉis unu elsendon al la Flavveŝtulaj manifestacioj kaj la ŝuldokrizo kiu kuŝas sub tio. (<https://www.rt.com/shows/keiser-report/446750-yellow-vest-debt-crisis/>) En la dua parto li intervjuas d-ron Michael Hudson, aŭtoron de nova libro ‘... and forgive them their debts’ [... kaj pardonu ilin iliajn ŝuldojn], pri la historio de ŝuldopardonado. Hudson klarigas, ke la regantoj de Bizanco forviŝis la savaĵojn de riĉuloj per pardono de ŝuldoj, ĉar nuligo de ŝuldoj ne kaŭzas ekonomiajn krizojn, sed preventas ilin. Li klarigis, ke la bronzepokaj babilonanoj ellaboris la matematikon de tio. Kunmetita interezo kreskas eksponencie, dum produkto povas kreski nur laŭlinie, kaj do kiom ajn estas la intereza procento, la nacia ŝuldo finfine elkreskos produktocon. Pardonu ŝuldon ŝajnas al mi esti kruda justeco por la individuo, sed la regantoj ne tiom interesiĝis pri la individuo; ili interesiĝis pri plufunkciado de la ekonomio, kaj havi stokon da sanaj junuloj taŭgaj por iliaj militoj. Mi atendas alvenon de la libro, sed intertempe mi rigardis revuon de la temo, verkitan en 2012, kiu aludas al la laboro de Michael Hudson, titolita, ‘La longa tradicio de ŝuldopardonado en Mezopotamio kaj Egiptio ekde la tria ĝis la unua jarmilo

aK' (<http://www.cadtm.org/La-longue-tradition-des>)

Unuavide la elekto en la Referendumo inter 'Leave' [Forlasu] kaj 'Remain' [Restu] ŝajnas kvazaŭ estas elekto inter ŝanĝo kaj la stato estanta. Sed la elekto 'Remain' estas elekto por radikala ŝanĝo, dum la Eŭropa Komunumo fariĝas la Eŭropa Unio. Unu tia ŝanĝo estas, ke uzuro en la ŝtata nivelo fariĝas fiksita en la juro. Tio validigas la jardekan spekulacion, ke la Komuna Merkato/ EEK/ EK/Eŭropa Unio estas grupo kiu favoras la bankistojn.

La ideo okazigi referendumon pri la brita membreco en EU leviĝis pro premo okazigi referendumon pri la Traktato de Maastricht, kiu enkondukus tiajn radikalajn ŝanĝojn en EK. Alia ŝanĝo al la stato estanta kiu pli-malpli frue estus implikita se Britio voĉdonus 'Remain' estus komuna valuto, la eŭro, kiu metis Grekion en tiom da malfaciloj. Depost la Traktato de Romo oni diris al ni, ke la ideo estas krei 'horizontalan ludkampon'. Se estus okazinta io tio estus nenia bezono de amasa migrado el la pli malriĉaj regionoj al la pli riĉaj, sed okazis ĝuste la malo, kaj plejverŝajne tiel daŭros. La regionevoluiĝa fondaĵo pagis por bela ĝardeno ekster la urbodomo de Bradford, dum Grekio estis detruata pere de uzuro.

Nuligo de ŝuldoj en la Bronza Epoko ne estis plenumita por esti afabla al la ordinaraĵoj homoj, sed por protekti la esencajn interesojn de la reĝo. Hodiaŭ la Establaĵo de Britio havas intereson teni la ekonomion funkcia, kaj havi stokon da sanaj junuloj por iliaj militoj, sed iel ŝajnas esti tabuo en la tradiciaj amaskomunikiloj kaj inter la ĉefaj politikistoj tion preparoli. Ĉu tiuj kiuj voĉdonis 'Remain' konscias, ke ili efektive voĉdonas por la instituciigo de uzuro, tiel garantiante, ke la riĉuloj fariĝu pli riĉaj, dum la malriĉuloj fariĝas pli malriĉaj?

Kaj ĉu ili konsciis pri la intenco krei EU-armeon? Kiel kunordiganto de kunvenoj de la londona esplor-grupo Keep Talking, mi dufoje provis aranĝi por parolanto pri tiu temo, kvankam ambaŭ provoj malsukcesis. Tamen la intenco nun estas malkaŝe preparolata fare de la ŝtatestroj ene de EU. Kio estus la celo de EU-armeo, kiam ni havas NATO-n? Klare, tia armeo povus esti uzata por teni internan ordon ene de la teritorio de EU. Imagu, se EU jam estus stariginta tian armeon. Kiu tenus ordon en Francio dum la Flavveŝtuloj manifestacias? Kiel EU insistus, ke Hungario sekvu la direktivojn de EU pri amasmigrado, alie ol ensendi la trupojn de EU? Kio okazus nun en Italio. kaj kio jam okazus en Aŭstrio kaj Grekio? Ĉu EU-trupoj patrolus la stratojn de Britio se Britio restus en EU kaj iam poste provus forlasi?

* Reveno de la Sturmabteilung

La afero de uzuro estis en la centro de la politiko jam plurmil jarojn, kaj daŭras esti. Tio nun estas la centra afero malantaŭ la Flavveŝtulaj manifestacioj, nun ne nur en Francio. Ĝi estas centra afero en la Traktato de Lisbono, kiu metas ĉiujn EU-landojn sub jugon de internaciaj bankistoj. Tio estas centra afero en la militoj kaj la pretekstoj por militoj. Depost 9-11 estis konstante kreskanta publika koncerno inter ordinaruloj pri tio kio okazas en publikaj aferoj. Individuoj kiuj faras tro da demandoj estas nomataj

‘konspirteoriistoj’, kaj grupoj kiuj okazigas kunvenojn pri aktualaj pretekstoj por militoj estas denuncataj kaj amaspremataj de vagantaj gregoj. Kunvenoj estas fermataj. Individuoj estas ruinataj. Mi antaŭ nelonge vizitis Germanion por paroli kun kolegoj tie pri la germana situacio. Ili komparis la aktivecojn de Antifa kun sia propra iama Sturmabteilung. Estas en tio io alarma kiam ĝi venas de Germanio. Sed okazas ankaŭ en Britio.

Multaj homoj nun agnoskas, ke la tradiciaj amaskomunikiloj esence estas komplikaj. Ĵurnalisto de The Guardian verkis libron ‘Flat Earth News’ [Plattera Novaĵo] skribante pri la falsaj novaĵoj en aliaj gazetoj, kvazaŭ Guardian estus senpeka. Pli lastatempe Udo Ulfkotte demisiis kiel ĵurnalisto ĉe Frankfurter Allgemeine, kaj verkis libron ‘Gekaufte Journalisten’ [Aĉetitaj Ĵurnalistoj], raportante kiel ĵurnalistoj de la tradiciaj amaskomunikiloj ĝenerale estis en la pago de la sekretaj servoj. Tiu fariĝis numero unu en la furorlisto de Spiegel.

Mia propra grupo, Keep Talking, havas nenian politikan motivon por prilabori alie ol esplori kio okazas malantaŭ la kulisoj en aferoj de militoj, terorismo kaj propagando. Laŭ Jewish News [Judaj Novaĵoj (en Britio)] La Kampanjo Kontraŭ Antisemitismen asertis por si respondecon en la fermo de unu el niaj

kunvenoj. (<https://jewishnews.timesofisrael.com/far-right-meeting-to-discuss-how-mossad-murdered-diana-stopped-on-police-advice/>). La homoj ĉe la kunveno diris al mi, ke ili fermas la kunvenon laŭ ‘polica konsilo’. La parolado estintus pri Princino Diana, kvankam la parolonto estus dirinta al ni kial li ĉesis esplori ŝian morton. Estis nenio en tiu kunveno kiu iel rilatis al antisemitismo, aŭ laŭ nia scio, al judoj, cionismo, Israelo, Mossad aŭ io ajn alia rilata al la israela lobio. La tutunua sugesto kiun mi aŭdis pri ajna eventuala ligo kun Mossad estis de la ‘ĵurnalisto’ de Jewish News, kiu kontaktis min antaŭ ol publikigi artikolon titolitan ‘Far-right meeting to discuss how ‘Mossad murdered Diana’ stopped on police advice: Secretive “Keep Talking” group's scheduled gathering in Holborn cancelled by venue after authorities intervene’ [Ekstremdekstra kunveno por diskuti kiel ‘Mossad murdis Diana’ ĉesigita laŭ polica konsilo: Planita kunveno de sekreta grupo ‘Keep Talking en Holborn nuligita de la kunveno post kiam aŭtoritatoj intervenis]. Mi deponis peton sub la akto Libero de Informoj al la bonfara instanco de la ŝtatservo ‘Charity Commission’, kiu agnoskas CAA kiel bonfaran organizaĵon, malgraŭ tio, ke ĝi okupiĝas pri politika kampanjado, kaj protektas ĝiajn kuratorojn per rifuzo publikigi iliajn

nomojn. (https://www.whatdotheyknow.com/request/on_naming_the_trustees_of_campaign). Mi deponis ankaŭ peton sub la akto Libero de Informoj al la Londona Metropola Polico por eltrovi ĝuste kiam ‘polican konsilon’ ili donis al la kunveno rilate al Keep Talking. (https://www.whatdotheyknow.com/request/information_concerning_cancellation) La ‘Charity Commission’ nur klarigis sian sistemon, kaj la polico grandioze rompas la leĝon per prokrastado, prokrastado kaj prokrastado.

Kiam ni rigardas la staton en kiu estas Britio hodiaŭ, kiel povas esti, ke la reĝino aludus

al io ajn alia ol tiu situacio, kiam ŝi diras “Eĉ kun la plej profunde sentataj diferencoj, trakti kun respekto la alian personon kiel fratan homon estas ĉiam bone kiel unua paŝo al pli bona interkompreniĝo”. La reĝino diris ankaŭ, “nur kelkaj homoj agnoskis Jesuon kiam li naskiĝis, nun miliardoj sekvas lin”. La plej granda ago de Jesuo, kelkajn tagojn antaŭ ol li estis krucumita, estis renversi la tablojn de la monŝanĝantoj en la templo, deklarante la tempon ‘ŝtelistejo’. Estis komence nur kelkaj homoj kiuj diras al ni tiajn aferojn pri EU, sed nun estas milionoj. Post 9-11 estis nur kelkaj homoj kiuj diras al ni, ke la registara rakonto estas memkontraŭdira, kaj rompus la leĝojn de fiziko. Nun estas milionoj, kaj eventuale miliardoj, kiuj malkredas la rakonton, kaj en Usono finfine iu federacia Granda Ĵurio sidos por aŭdi la pruvojn pri la malkonstruo de la Monda Komerca Centro. (<https://www.ae911truth.org/grandjury>)

La reĝina kristnaska mesaĝo devus esti atentita de ĉiuj, kaj aparte de la por-Establaj stratbandoj kiuj fermas liberan parolon en tiu ĉi lando, helpataj kaj subtenataj de la por-Establaj tradiciaj amaskomunikiloj, ‘Charity Commission’ kiu turnas blindan okulon al la politikaj por-Establaj ‘bonfaraj organizaĵoj’, kaj polica servo kiu pretas rompi la leĝon por maski sian propran implikiĝon. Ni ne estu cerbolavitaj de la tradiciaj amaskomunikiloj por pensi, ke temis nur pri vigla debatado en la malsupra ĉambro de la parlamento. La Libero de Parolo devus esti restarigita en ĉiuj niveloj por tiu ĉi iam fiera nacio.

Ian Fantom MSc estas Scienca Informisto kun fono en Fiziko. Depost sia emeritiĝo li priesploris la kolapson de la Esperanto-movado en Britio, kaj enplektiĝis el la Veromovado pri 9-11. Sekve de la disrompiĝo en tiu movado li starigis kun Nick Kollerstrom en 2010 la grupon ‘Keep Talking’ [Tenu vin parolantaj], kiu okazigis kunvenojn en Centra Londono ĉiumonate, kun escepto de tri kiuj estis nuligitaj de por-Establaj grupoj kiuj ŝajnas esti parto de la Israela Lobio.

- KOMENTOJ

La plej stulta intervjuo, kiun mi entute legis en la lasta tempo:

<https://www.rundschau-online.de/region/bonn/koenigswinter/kunstsprache-Esperanto-nur-16-grammatische-regeln-und-keine-ausnahmen-31807966>

Chi tiu sinjorino faras la impreson de predikanto de radikala usona sekto. Ankau kion ŝi rakontas estas grandparte altgrade dubinda:

<https://www.youtube.com/watch?v=ZsHQck46lvl>

Tiuj homoj lernis nenion el lastatempe farita kritiko kaj obstine daurigas sian kurson, kio faras ilin altgrade ridindaj kaj senesperaj.

Se la Eo-movado volus progresi, estus tempo prezenti pli inteligentajn enhavojn kaj forgesi la malnovajn mitojn kaj legendojn.

aK, jan. 19 www.planlingvoj.ch

Artikoloj

- La festo de Buzmo en Albanio

La festotago de Buzmo aŭ nobla Buzmo estas festotago de renaskiĝo de Dieco Suno, kiu koincidas al vintra solstico aŭ vintromezo, je 21-an de decembro.

Post 22-an de decembro, kiam estas noktopinto, la tago komenciĝas plilongiĝi kaj la Suno "renaskiĝas" por la nordaj popoloj, ĉar ĝi denove aperas sur horizonto. En albanaj teroj ĝi konatas kiel nobla Buzmo, tiu rito ankoraŭ praktikiĝas ĝis nuntempe.

Ĝi konatas ankaŭ kiel festotago de vintromezo aŭ "Buzma nokto" (en Dukagjin, Nikaj-Mërtur), Kshnellat, Kërshëndellat, Ditëknella (Mirditë), la mezo de la vintro, (Lumë), kiu okazas je 24-an de decembro, kiam komenciĝas la plilongigo de la tago, "returniĝo de suno pro somero".

Karakterizaĵo de tiu festotago estas nobla Buzmo, granda ŝtupo estas metita sur kameno kaj ekbruliĝas tiun nokton. La Buzmo kun la fajro, kun ties varmo kaj lumo similas al suno, pro tio oni gratulas kaj regalas ĝin kvazaŭ ĝi estus homo alportanta someron.

La eklezio klopodis rompi ĉi riton, anstataŭante tion per naskiĝo de Kristo plutenante kelkajn paganajn ritojn, sed pratempa Ilira kredo ankoraŭ vivas en niaj teroj de parto de albanoj kiuj festas ĝin laŭ iliro-arbraj ritoj.

(Ĉerpita el Wikipedia)

- **Esperanto, julio 2018**
Komento pri:

<http://esperantio.net/index.php?id=3519>

<http://www.liberafolio.org/2018/05/28/kiel-junigi-la-movadon>

<http://sezonoj.ru/2018/05/ondo-29/>

<https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/11729>

<http://sezonoj.ru/2018/05/corsetti>

<https://www.liberafolio.org/2018/06/27/Esperanto-furoras-en-renkontigejo-de-duolingo>

Ĉiuj tiuj artikoloj plene konfirmas la pravecon kaj ĝustecon de ĉiuj miaj analizoj, asertoj, hipotezoj kaj prognozoj de la pasintaj jaroj.

Sed unue ni okupiĝu pri jena kurioza citaĵo:

„de Blanke al Tonkin, de Silber al Sikosek. Tiam eblus pli fidinda komparado de ideoj, proponenda al la enketotaj gejunuloj laŭ specifa demandaro. Parenteze, en la konsultita literaturo mankas kaj Galor kaj Ŝelazny kaj Révész...“

Laŭ mi, nenio fidinda plu estas ĉe tiuj aŭtoroj, kiuj plejparte produktis nur ŝaŭmon kaj fumon. Hodiaŭ oni scias, ke tiuj kaj aliaj similaj „sciencistoj“ eraris kaj kondukis Esperanton, Esperantologion kaj interlingvistikon en la sakstraton kaj dilemon, kvankam en la 70-80aj jaroj multaj ankoraŭ kredis, ke ili kreas la fundamenton de tiuj fakoj, kiuj eble kun la escepto de Poznań hodiaŭ nenie en la mondo estas agnoskitaj de la scienco. Esperantologio kaj interlingvistiko falis en la manojn de fundamentalis-maj Esperanto-propagandistoj kaj fariĝis propagandaj armiloj de la Esperanto-movado, kiu estas influata, regata kaj kontrolata de ideologoj, kiuj, malgraŭ nuancoj, ĉefe apartenas al la politike radikala maldekstra spektro kaj do apriorie perdis sian objektivitecon. Unu el malmultaj aŭtoroj, kiu ne praktikas historiografian kaj pseŭdosciencan fantaziadon, eble estas Sikosek (alinome van Dijk), ĉar li baziĝas sur realaj faktoj, kiujn li traktas kadre de la internacie validaj normoj de la scienco (kun kiuj Esperanto havas malmulton komunan). Kontraŭbatali tiun fantazion, forviŝi tiujn ŝaŭmon kaj fumon estas ege malfacile, ĉar dum jardekoj funkciis ege potenca Esperanto-propagando, kiu evitis ĉian kritikon de interne kaj ekstere kaj disponis pri forta solidareco inter esperantistoj kaj praktike neniam estis kritikata, pridubata aŭ kontraŭbatalata de ili mem, escepte de tiuj, kiuj dekomence estis kontraŭ Esperanto (sed kutime ili ja ne estis e-istoj).

Koncerne la disertaciojn verkitajn de diverslandaj ne-eistoj, ilia problemoj estis, ke esence ili baziĝis sur la verkaro de la supre nomitaj kaj aliaj similaj aŭtoroj (ĉar io alia pri interlingvistiko ne ekzistis/as) kaj do riskis senkritike remaĉi la malnovajn teoriojn, konsistantajn el mitoj kaj legendoj, asertoj, hipotezoj kaj spekulativoj, kiujn la Esperanto-propagando disvastigis kaj daŭre disvastigas. Mem ne konante la temaron (t.e. la historion de la Esperanto-movado), eĉ iliaj profesoroj emis/as kredi la kuriozaĵojn, kiujn tiuj doktoriĝantoj skribis pri Esperanto. Do, verki (batali) kontraŭ tiu tendenco estis/as ege malfacila tasko, ĉar kiel kritikisto oni estis/as sisteme ignorata kaj bojkotata praktike de ĉiuj tiuj ideologiaj fanatikuloj kaj dogmuloj, kiuj kredis, ke ili posedas la interpretan monopolon kaj reprezentas la veron pri Esperanto kaj kredas sin sur la ĝusta flanko de la historio. Ajna racia diskuto kun ili ne estis/as ebla, ĉar ili restis surdaj, mutaj kaj blindaj por ĉiuj raciaj argumentoj.

La tuta interlingvistika literaturo kreita de antaŭ 1989 (kaj ankaŭ poste) devas esti reekzamenata laŭ valideco kaj aktualeco en la nuna tempo. La paradokso estas, ke tiu literaturo eble aktualis kaj iom validis en la tempo antaŭ 1989, en kiu regis aliaj politikaj kondiĉoj kaj konstelacioj en la mondo, dum nuntempe ĝi verŝajne perdis sian aktualecon kaj aspektas tute

arkaike, kvankam la nuntempaj esplorantoj kaj verkantoj de interlingvistikaj disertacioj daŭre baziĝas sur tiu malnova literaturo, ĉar alia ne ekzistas.

Kiel ilustras la nomaro de la prelegantoj de la Esperantologia konferenco dum la lisbona UK (2018), la fako estas esence dominata de samtipaj konservativaj malnovaj aktivuloj, kiuj ankaŭ kontrolas la interpretan monopolon (evitante ke ekzemple Blanke povos esti kritike traktita), kio signifas, ke la refreŝiĝo de la diskuto kaj la renoviĝo de la fako mem estas apriorie malhelpataj (ĉar neniu kuraĝas diri ion kritikan).

Krom tio ekzistis kaj ekzistas diversaj skurilaj movadaj propagandistoj, kiuj agis/as ekster tiu scienca kadro kaj tial kondukis Esperanton al tragika situacio, en kiu ĝi komplete perdis sian kredindecon ĉe la ekstera publiko, kiu nur ridas pri „tiuj strangaj esperantistoj” kaj hezitas konsideri ilin serioze. Per tio oni ruinigis la seriozan laboron, kiun klopodis/as efektiviĝi iuj instruistoj kiel Koutny, Kováts aŭ Gacond, nomoj kiuj praktike mankas en la artikoloj kaj komentoj de Silfer. Kial li subite estas tioma adoranto de Blanke kaj Tonkin, kiujn li rifuzis agnoski dum jardekoj, mi ne komprenas. Sed se oni provas kompreni lian (bizaran) penskonstruaĵon, oni eble eĉ sukcesas kapti lian logikon, kvankam temas pri kompleta fantazio. Nu, per sia elstara „Historio de la Esperanto-literaturo“, kiun li eldonis kun Carlo Minnaja, Silfer povis savi sian reputacion, kvankam multaj interpretoj de tiu literaturo, kiujn li prezentis en tiu verko, restas konsumindaj nur kun prudento. Ĉiutage oni povas fariĝi atestanto de liaj obsedaj kaj senutilaj raŭmismaj kaj civitaj iluzioj, kiujn li ne forĵetis, kvankam oni ofte rekomendis tion al li.

Esperanto preskaŭ totale perdis sian signifon

Post la falo de la komunismo, en orienta Eŭropo la Eo-movadoj praktike komplete perdis sian (politikan) signifon kaj diskreditiĝis, ĉar ili estis absorbataj, misuzataj kaj uzurpataj de la tieaj politikaj reĝimoj por propagandaj celoj, nature kun la firma apogo de la oficialaj Esperanto-asocioj, kiuj neniam kritikis la politikan karakteron de la Esperanto-agado en tiuj landoj, plej malmulte en Bulgario, por mencii drastan konkretan ekzemplon. Okazis eĉ male: La Esperanto-movado (inkluzive de la okcidenta) entuziasme laŭdis kaj aplaŭdis la „sukcesojn, atingojn kaj progresojn” de la Esperanto-movado en tiuj landoj, ne konsciante aŭ ne interesiĝante pri tio, en kiu tikla politika situacio, kvazaŭ kiel ostaĝoj de la komunismaj reĝimoj, ili troviĝas kaj kio politike okazas en tiuj landoj, nelaste rilate al la homaj rajtoj, kiujn la Eo-movado ja ankaŭ iel celis defendi. Kiel apendico aŭ akcesoraĵo de la komunismaj reĝimoj, la Eo-movadoj en tiuj landoj, kiujn post la politikaj ŝanĝoj en 1989 amase forlasis la iamaj „esperantistoj”, fariĝis kvazaŭ superflujaj kaj politike orfiĝis. En Bulgario kaj Ĉinio, la iamaj ĉefeldoradoj de la Eo-movado, la iamaj aktivuloj preskaŭ komplete malaperis, aŭ forpasis pro alta aĝo, kaj ne povis esti reale anstataŭigitaj per novaj, egalaj fortoj. En Pollando ĝi iom pluekzistis, ĉar la poloj konsideras Esperanton kaj Zamenhofon kulturaj heredaĵoj de Pollando, kio donas al la Eo-movado certan ekzistorajton, kvankam la juna generacio ne plu scias kio estas Esperanto kaj kreskantaj dekstraj naciismaj politikaj fortoj pli kaj pli ignoras ĝin. Kvankam la judeco de Zamenhof estis iel agnoskita, Zamenhof kaj Esperanto estis uzurpataj ekskluzive kiel pola afero,

dum rusoj kutimas akcenti la rusecon de Zamenhof kaj litovoj insistas pri la versio, ke Zamenhof originis el Litovio (aŭ Litovujo). Israelo restis indiferenta al Zamenhof, kiu siatempe forlasis la cionismon kaj ne volis kredi je la granda estonteco de la hebrea lingvo. Sed ekzemple ankaŭ en Svislando la registaro turnis sian dorson al Esperanto, kiun ĝi apogis dum jardekoj pere de radioelsendoj de Svisa Radio Internacia, kiuj finiĝis en 1991 aŭ 1992. Hodiaŭ la ĉefaj protagonistoj de tiu malnova Esperanto-movado estas traktataj kiel herooj, kiel ilustras ekzemple la enciklopedio de Aleksandr Korĵenkov el Kaliningrado, kiun li verkis kun la financa apogo de sponsoro Tonkin kaj konsorcianoj kvazaŭ kiel definitivan oficialan nekrologaron pri la ĉefaj diligentuloj de la malnova Esperanto-movado. Kiel en sovetiaj tempoj, en kiujn la Eo-movado ŝajne refalis aŭ riskas refali, kritika traktado de la rolo de tiuj herooj en la tiama komunisma sistemo komplete mankas. Komprenoble, ankaŭ pri socialismo kaj komunismo, kiuj siatempe estis fanatike glorataj kaj propagandataj de la sama Esperanto-movado, neniu plu parolas, kaj ekzemple bulgaraj esperantistoj ne plu emas respondi, se oni demandas ilin pri tiu temo. La biografioj de GDR-anoj en Vikipedio estas tiel purigitaj, ke pri ilia „elstara“ politika kaj propaganda rolo en GDR la legantoj preskaŭ nenion ekscias. Pli kaj pli tiu generacio forpasas, tiel ke baldaŭ neniu plu scias, kio siatempe okazis, kaj ŝajnas, ke oni ankaŭ nenion plu volas scii kaj ne plu interesiĝas prie, ĉar la temo estas tro malagrabra, embarasa, malaktuala kaj fora.

La Eo-movado ĝis nun ne kapablis reagi al la neceso kaj bezono de siaj renoviĝo kaj reformiĝo kaj ne eltiris la necesajn kaj ĝustajn konkludojn, sekvojn kaj konsekvencojn. Male, ĝi ĉefe nostalgias pri malnovaj „gloraj“ tempoj, celante konservi la malnovajn strukturojn, fanfaronas pri „sukcesoj, atingoj kaj progresoj“ kaj panike klopodas savi la movadon per la interreto, kie laŭdire milionoj da homoj lernas Esperanton. Sed la realeco estas alia, nome konstantaj degenerado, putrado, ŝrumpado kaj marasmado, fine malapero de la malnova movado. Eble mi vidas la aferojn tro pesimisme, sed la ĝeneralaj tendencoj klare montras en tiu direkto. Ĉe UEA restis giganta financa defcito, kiu amasiĝis dum la jaroj sub indiferentaj kaj senrespondecaj asociaj gvidantoj (cetere ĉiuj estis radikalaj politikaj maldekstruloj, kiuj akre kritikis kaj neas la „kapitalismon“ kaj kulpigas la „hegemonion“ de la angla lingvo pro la mizero de Eo), ĉar oni ne kapablis mastrumi la financojn kaj tro elspezis sen sufiĉe enspezi. Gvidata de idiotoj, UEA ne nur montris sin malkapabla solvi la ekzistantajn problemojn, kiujn oni ignoris, neglektis, prisilentis aŭ bagateligis, sed ĝi ankaŭ evidentiĝis ne kapabla reformi kaj renovigi sin mem, ĉar krom la mondefcito kreskis ankaŭ la amaso de la organiza kaj administra balasto. Sed UEA, grandparte okupata pri si mem kaj daŭre konvinkita pri sia historia graveco, fanfaronis ĉefe pri laŭdiraj sukcesoj kaj progresoj de Esperanto (vd. la jarraportojn kaj rezoluciojn de UEA), praktikis stultan propagandon kaj ne rimarkis, eĉ obstine rifuzis rimarki aŭ agnoski, ke ĝi kondukis la asocion kaj kun ĝi la movadon al la rando de la abismo (sed ŝajnas, ke ekzistas ankoraŭ sufiĉe da homoj en UEA, kiuj ne komprenis, ne konscias kaj ne interesiĝas pri tiu problemo).

La interreto apenaŭ povos savi la malnovan Esperanto-movadon

La kursiniciatoj en la interreto eble estas laŭdinda provo por savi Esperanton, sed ĝis nun tro malmultaj el tiuj kursanoj aliĝis al la movado aŭ fariĝis veraj e-istoj, transprenante asociajn respondeciojn kaj funkciojn, aŭ produktante konkretajn substancajn kontribuojn (kiel verkadon de libroj kaj artikoloj), pro kio la ideo savi Esperanton pere de la interreto probable restos iluzia. 1,7 milionoj da lernantoj en la interreto devas esti konsiderata kiel pura bluf. UEA nenion utilan faris, faras kaj faros por integri tiajn kursanojn en la movadon, kiuj verŝajne eĉ ne (kon)scias, ke ekzistas UEA aŭ iu „fizika“ Eo-movado kaj ankaŭ ne interesiĝas prie, ĉar ĉefe ili volas lerneti la lingvon, kiun ili plene ellernas nur malofte.

Nur produkti virtualajn e-istojn aŭ interretajn statistojn ne sufiĉas por savi Eon. Esperanto vivis de aktivaj asocioj kaj de lokaj, landaj kaj internaciaj kunvenoj, de publikaj manifestacioj, do la Esperanto-movado estis esence „fizika“ movado (ĉar movado de vojaĝado, turismo, flegado de „fizikaj“ kontaktoj kaj aktiva partoprenado, verkado ktp.). Se tiu fizika aspekto forfalas, oni devas timi, ke la Esperanto-movado malfortiĝos kaj finfine malaperos. Sen *daŭraamasa lojaleco* al ĝi kaj sen *praktika aktiva kaj fizika intimeco* kun ĝi tia kunvena kaj propaganda movado apenaŭ povas esti vivtenata. La interreto povas esti helpilo sed ne anstataŭi tradiciajn organizajn formojn. Aliflanke, oni ne povas ekskludi, ke en aŭ per la interreto aperos novtipa Esperanto-movado, kvankam ĝiaj konturoj ĝis nun ne estas klaraj. Oni povas turni la temon kiel oni volas, neniuj povas hodiaŭ diri, kiel ĝi plue disvolviĝos kaj evoluos.

Krom tio en la interreto mankas (Esperanto-)substanco. La informoj kaj diskutoj en la t.n. sociaj medioj estas grandparte supraĵaj, malinteresaj kaj senutilaj, do temas pri superflua balasto. Ili disvastigas amason da dubindaj informoj kaj en diskutforumoj elpaŝas radikalaj kaj ofte anonimaj opiniantoj, kiuj estas kontraŭ ĉiuj kaj ĉio. En multaj landoj (kiel Kubo, Ĉinio kaj Irano), kie la libera interreto estas rigore cenzurata kaj subpremata, mankas al la homoj aliro al tiu amaskomunikilo, do la (internacia) komunikado estas ĝenata, kio signifas, ke la korespondado aŭ interŝanĝo kun homoj el tiuj landoj estas apriorie malebla. Do, la utilo, kiun la interreto ĉi-rilate alportis ĝis nun, estis pli ol magra, malgraŭ la „milionoj“, kiuj laŭdire lernis Esperanton. Elstaran rolon la interreto ludas kiel anoncilo kaj informilo (kalendarioj, libroj), sed tio ne sufiĉas por revivigi tradician fizikan movadon. Bedaŭrinde, la Esperanto-movado utiligis la interreton ĝis nun en nesufiĉaj kvanto kaj kvalito por siaj bezonoj kaj celoj.

La Esperanto-movado bezonas novtipajn strukturojn

Pri tradiciaj kaj novtipaj gazetoj: La merito de gazetoj kiel *Ondo de Esperanto* aŭ *Heroldo de Esperanto* estis/as, ke ili iom raportis/as pri okazaĵoj en la Eo-movado kaj tiel do plenigis/as la vakuon, kiun postlasis krizaj aŭ malsukcesaj revuoj. Sed la stilo de *OdE* kaj aliaj samtipaj Eo-gazetoj estas tro movadeca kaj malmoderna, ke oni verŝajne ne abonas ilin nur por legi raportojn pri ĉiam samaj aranĝoj, kutime verkitaj en rutine memlaŭda-fanfarona, t.e. senkritika tono de iliaj organizantoj mem. La rapida ŝrumpo de la malnova Eo-movado sekvigis drastan reduktiĝon de la nombro de abonantoj de gazetoj kaj aĉetantoj de libroj. Ĉu la transiro al la elektronika versio povos savi kaj plu vivteni tiujn gazetojn kun ne pli ol du-tricent abonantoj estas tamen dubinde. Kio mankas al la Eo-movado estas *vere interesa* kaj *inteligenta* revuo laŭ la stilo

de *TIME*, *SPIEGEL*, *CICERO* (D), *DIE REPUBLIK* (CH) k.s. Sed ĉu ankaŭ ekzistas la legopubliko por tio?

Oni do povas bedaŭri la degeneron kaj malaperon de la malnovaj societoj, kie diversaj asociemaj homoj fartis bone, sed sincere dirite, inteligentaj kaj modernaj homoj ne vidas kialon viziti iliajn kunvenojn, ĉar tie okazas nenio interesa aŭ utila. Cetere, daŭre ekzistas nacilingvaj asocioj kun centoj aŭ miloj da membroj, ĉar ili respegulas aktualan bezonon de la homoj, dum por Esperanto ekzistas neniu (aŭ tre malgranda) aktuala bezono. Do, la aserto de Renato Corsetti, ke la asocioj malaperas pro „manko de idealismo de la homoj“, ne trafas la esencon. Sed eble ĝi trafas la esencon de la Eo-movado, kiu perdis siajn idealistojn. Ĉiuj Eo-propagandistoj, kiuj lamentas, ke la Eo-societoj formortas kaj ke la membronombro de Eo-asocioj ŝrumpas kaj elvaporigaŝas, devus sin demandi pri la veraj kialoj de tiu problemo – kiu nome situas en la (preskaŭ) totala signifoperdo de Esperanto en la mondo, ne nur el politika aŭ lingvopolitika vidpunkto. Do, en la kazo de la krizo de la Eo-movado ne temas nur pri la problemo de kotizoj kaj membriĝoj aŭ de la interreto, sed pri la malkreskanta signifo de Esperanto mem.

Se do ĉiuj tiuj negativaj tendencoj firmiĝos kaj daŭros, oni devos timi la scenaron skizitan de Tazio Carlevaro, nome la kompletan malaperon de Eo kiel movado kaj lingvo, ĉar Eo estas praktike elmortanta tutmonde, kvankam ĉiam ekzistos iuj unuopuloj, kiuj okupiĝos pri ĝi. Esperanto estas afero de la pasinteco, ne de la estonteco. Oni ankaŭ ne povas kulpigi la anglan lingvon pro la mizero de Eo, kvankam tiu ĉi lingvo, kiu ludas la rolon de universala lingvo, ja teorie influis la situacion de Esperanto, sed nur teorie, ĉar Esperanto neniam estis serioza konkurento aŭ rivalo de la angla lingvo, kiu fariĝis la ĉefa imagita, inventita malamiko de la esperantistoj, montrantaj paranojajn kaj skizofreniajn trajtojn. Zamenhof neniam malŝatis aŭ kritikis la anglan lingvon, sed tion faris la postaj (sovetiaj) komunistoj kaj iliaj eksterlandaj komplikoj kaj agentoj, al kiuj apartenas ankaŭ certaj esperantistoj en UEA, kiuj polemikis kontraŭ Usono, la Okcidento, la angla lingvo, ktp. Ŝajnas, ke la esperantistoj neniam aŭ ankoraŭ ne komprenis, ke per sia idiotisma propagandismo kaj ridinda, embarasa aktivismo ŝovelis sian propran tombon. Hodiaŭ, la Esperanto-movado servas nur ankoraŭ ĉefe al amuziĝo, turismo kaj propagando. Se ne ekzistus la „amuza“ („gaga“) kaj turisma-propaganda kaj kun ĝi la sektema aŭ misia faktoroj, kiuj estas la ĉefaj aliroj al Esperanto, aŭ – pli pozitive – la socia faktoro, kiu ankoraŭ vivtenas ĝin de kongreso al kongreso kaj de jubileo al jubileo, la Eo-movado verŝajne estus jam delonge morta, ĉar aliaj faktoroj (kiel la kultura, literatura, scienca, politika kaj ekonomia) ludas nur marĝenan rolon, kvankam ili devus havi la prioritatan signifon. Do, mankas substanco. La ĉefa kaŭzo de tiu mizero estas, ke de jardekoj la samaj aktivuloj ludas la saman rolon (aŭ samajn diversajn rolojn) kaj diktas la saman tonon, kaj due ke multaj iamaj aktivuloj retiriĝis de la aktiva movado, dum mankas nova publiko, kiu povus substance refreŝigi, renovigi kaj refortigi Esperanton kaj ĝiajn movadon kaj kulturon, kiuj estas minacataj de elmortado kaj malapero kiel la lingvo kaj kulturo de indiĝena tribo, aŭ kiel Volapük.

Observinte la Esperanto-movadon kaj studinte ĝian historion dum 40 jaroj, oni venas al la konkludo, ke al la Esperanto-movado – aŭ al ĝiaj protagonistoj kaj adeptoj – riproĉindas senlima

naiveco, blinda ideologia fanatiko kaj idiotisma propagandismo, politika oportunismo kaj hipokritado, senrespondeco, indiferenteco kaj obstinaj ignorado kaj rifuzado de kritiko de interne kaj ekstere. Alimaniere dirite: La Eo-movado lernis nenion kaj ankaŭ volis lerni nenion el kritiko. Tio kondukis al ĝenerala krizo de la Esperanto-movado, pri kies stato kulpas neniu alia ol la esperantistoj mem, kiuj, cetere, tro multe fidis al diversaj politikistoj, diplomatoj kaj homoj kun prestiĝo. Dum unu parto de la esperantistoj estas ideologiaj fanatikuloj, la alia parto estas indiferenta kaj „ĝuas la vivon“ dum turismaj kaj libertempaj aranĝoj (kio ja ne estas malpermesata). La solaj pozitivaj aferoj, kiujn oni povas vidi en la historio de tiu movado, estas senperaj interhomaj kontaktoj trans (fermitaj) ŝtataj limoj kaj antagonismaj politikaj sistemoj kaj kelkaj interesaj skribaj verkoj. Sed hodiaŭ la ŝtataj limoj estas ĝenerale malfermataj, ne nur en Eŭropo. La lingva nivelo de la esperantista plebo estis, cetere, ĝenerale malbona, same la nivelo de la kulturo de ilia movado, kiu estis nenio alia ol primitiva kopio de la nacilingvaj kulturoj. Per tio oni certe gajnis neniun nobelpremion.

Estas do tre dubinde, ke la Esperanto-movado povos ripeti siajn internaciajn „ sukcesojn, atingojn kaj progresojn“, kiujn ĝi sendube havis en la 20a jarcento, ankaŭ en la 21a jarcento. La spirito de tiu epoko ne favoras Esperanton.

Ankaŭ la lastatempe distrumpetita komunikado de V. Hromov (en Kuressaare sur la malgranda marinsulo Saaremaa), ke la „Esperanto-Instituto de Estonio“ estis relanĉita, devas, kiel nova elstara ekzemplo de tipe esperantista blufado, esti konsiderata kiel nura ĥimero, ĉar en tiu balta lando la kapacito de la Esperanto-movado kun sume 14 membroj kaj 9 delegitoj de UEA praktike jam de longe elĉerpiĝis kaj ne estas restarigebla. Sama sorto minacas Latvion kaj Litovion – kaj multajn aliajn landojn de la mondo, kie Esperanto „prosperis“.

Miaopinie, Esperanto povus esti „savita“ nur, se ĝiaj verkistoj, ĵurnalistoj kaj publicistoj forlasas la malnovan propagandismon, per kiu oni povas konvinki neniun plu, kaj komencas dediĉi sin al internacie aktualaj temoj (kiuj povas esti ankaŭ politikaj), pri kiuj skribas kaj legas ankaŭ nacilingvaj verkistoj, ĵurnalistoj kaj publicistoj. Al tiu ĉi kategorio de agado apartenas ankaŭ la studado de la historio de la Esperanto-movado kaj objektiva verkado pri ĝi laŭ la normoj de la internacia scienco, anstataŭ laŭ la principoj de la Esperanto-propagando, kiuj estis aplikataj ĝis nun. Krom tio devas esti trovitaj novaj kaj *sendependaj* strukturoj, fontoj kaj fondaĵoj por apogi Esperanto-studojn, por ke oni ne plu devu eterne dependi de la tonkina UEA-movado, kiu mem elektas siajn sponsorajn preferojn kaj neglektas la kritikan esploradon.

Andreas Kuenzli, julio 2018 http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_julio2018.pdf

- **Religio ne kongruas kun maltoleremo**

En la ĵurnalo *Folha de S.Paulo* en la jardeko post 1980, mi respondis al leganto, ke mi ne konsideras Religion kiel areojn por sovaĝa luktado, en kiuj multaj kredoj perfortas unu la alian en la atako aŭ en la defendo de principoj, aŭ de Dio, kiu estas Amo, kaj kiu tial nepre ne aprobas

manifestiĝojn de malamo sub Lia Sankta Nomo, kaj ne bezonas koleran defendon flanke de kiu ajn homo. **Alziro Zarur** (1914-1979) diradis ke, "*plej granda krimulo en la mondo estas tiu, kiu predikas malamon nome de Dio*". Mi komprenas Religion kiel Solidarecon, Respekton al la Vivo, Lumigon de la Spirito, kaj ni ĉiuj estas spiritoj. Mi nur povas kompreni ĝin kiel ion dinamikan, vivantan, pragmatan, altruisme konstruan, kiu malfermas lumajn vojojn en la animoj kaj pro tio devas stari sur etika fronto. Mi ne komprenus ĝin, se ĝi ne agadus ankaŭ per prudenta maniero por la transformiĝado de bedaŭrindaj realaĵoj, kiuj ankoraŭ turmentas popolojn. Ĉi tiuj pli kaj pli bezonas Dion, kiu estas kontraŭveneno kontraŭ spiritaj kaj moralaj malsanoj, sekve ankaŭ kontraŭ la sociaj malsanoj, inkluzive de pasiveco, sekteco kaj maltoleremo, kiuj degeneras, mallumigas la Spiriton de homamasoj. (...) Kaj oni neniel devas flankenlasi ateistojn for de kiu ajn iniciato, kiu bonfaros al la mondo. Religio, kiel sublimigo de sentoj, taŭgas por plibonigi la Homon, kunigi lin al lia Kreinto, per praktikado de Frateco kaj de Justeco inter Liaj kreitoj. Kun delikata sento de oportuneco, Profeto **Muhammad** rekomendas, en la Sankta Korano: "*Ni kredas tion, kio estis al ni revelaciita, kaj tion, kio estis al vi revelaciita. Nia Dio kaj via Dio estas la sama. Al Li ni submetiĝas*".

Dio, Saĝeco kaj Kompreno

La Ĉiela Patro estas senfina fonto de saĝeco kaj kompreno, kiam oni ne analizas Lin per maniero stereotipa kaj karikaturna. Mi ekmemoras ĉi tiujn vortojn de Sankta **Tereza el Avila** (1515-1582): "*Ni klopodu ĉiam rigardi la virtojn kaj bonaĵojn vidatajn ĉe aliaj homoj, kaj kovri iliajn malbonajn kvalitojn per niaj grandaj pekoj*".

Ĉio evoluas. Hieraŭ oni asertis, ke la Tero estas la centro de la Universo. Kial do la kredoj devus senmoviĝi ĉe la tempofluado? Male, religio, kiam ĝi estas sinonimo de mizerikordo, devas harmonie prilumi la ceterajn tavolojn de la penso. Ĉi-rilate, jen mi prezentas frazon de la tute skeptika **Voltaire** (1694-1778): "*Toleremo estas same necesa en politiko kiel en religio. Nur fiero estas netolerema (...)*".

Por mildigi kormalvarmon

Konvenas krome rememorigi ĉi tiun vastsignifan maksimumon de Zarur: "*Religio, Filozofio, Scienco kaj Politiko estas kvar aspektoj de unu sama Veraĵo, nome Dio*".

Nu, la klopodo konservadi tiujn branĉojn de universala scio ŝlositajn en fermitaj departementoj, aŭ en antaŭjuĝa konflikto, daŭre kaŭzadas multe da malbono nin afliktanta, ĉefe kiam temas pri Religio, se oni komprenas ĝin laŭ plej alta signifo. Ĉefe el tiu kampo devas veni solidara spirito, manke de kiu rezultiĝas malvarmeco ĉe sentoj, kiu precipe lastatempe karakterizas homajn rilatojn.

Ne estos Paco, dum persistos kruelaj diskriminacioj kaj krimaj sociaj malegalecoj

Manko de Frateco kaŭzadas grandan breĉon inter materia progreso kaj morala kaj spirita maturiĝo. Sed ĉiam estas tempo mildigi resentojn. Tamen, ne ekzistos Paco, dum persistados kruelaj diskriminacioj kaj krima socia malegaleco, kaŭzataj de troavido, kiun oni devas

kontraŭbatali per efika Edukado kun Ekumena Spiritualeco. Se ni ne elektos tian vojon, ni estos kondamnitaj al realaĵo montrita de **Gandhi** (1869-1948): “Okulo pro okulo, kaj la tuta homaro fine blindiĝos”.

Ĉiam eblas atingi bonan rezulton, se la homoj fidele klopodas por ĝi. Kaj tio daŭre faras, ke la civilizo, almenaŭ tiu, kiun ni vidas ĉirkaŭ ni, mirakle postvivas plej grandajn frenezaĵojn. La saĝeco de *Talmudo* praktike instruas: “*Paco estas por la mondo same kiel fermento por pasto*”. *Precize*. Ekzistas homoj, kiuj emas aludi al religia spirito per elstarigado de patologiaj misfaroj okazintaj laŭ la jarmiloj. (Mi neniel inkluzivas en ĉi tiujn komentariojn la prudentajn historiistojn kaj analizistojn). Mi pensas, ke tiu malpacema agmaniero, kiu makulis per sango la Historion, devas resti for de niaj koroj, pere de justaj agoj, ĉar pli grandaj estas la motivoj por nia kunfratiĝo ol tiuj, kiuj emas inciti malamon. Malamo estas armilo turnita kontraŭ la brusto de tiu, kiu malamas. Estas do tre oportuna ĉi tiu admono de Pastoro **Martin Luther King** (1929-1968), kiu ne rifuzis oferi sian vivon mem por la idealoj, kiujn li defendis: “*Ni lernis flugi kiel birdoj kaj naĝi kiel fiŝoj, sed ne la arton kunvivi kiel fratoj*”.

La miraklo, kiun Dio atendas de Homoj estas tiu, ke ili lernu ami sin reciproke, por ke ili ne freneziĝu, entute, kiel okazis ĉe esplorado por milita uzado de antimaterio.

Plej bona altaro por adori la Kreinton estas Ties kreitoj. Fariĝas urĝe ke, la Homaro estu humana.

Modereco kiel virto

En la verko *Meditadoj el la Animo*, mi notis, ke ne estos daŭra Paco dum oni starigados nepravigeblajn privilegiojn, kiuj malhonorigas la homan kondiĉon, pro manko de solidareco, kiu devas lumigi homojn kaj popolojn. **Pierre-Joseph Proudhon** (1809-1865) skribis: “*Paco akirita per glavo estas nur paŭzo en la milito*”. Tial, dum jarmiloj da “civilizacio”, homamasoj mortis sub masakro per armiloj, per malsato kaj per malsano. (...) Jesuo ĉiam predikis kaj travivis Fratecon. Ĉar ni ja kredas la Dian Estron, tial ni devas batali por tio, kion Li prezentis kiel solvon al la turmentoj, kiuj ankoraŭ afliktas naciojn. Modereco estas nemalhavebla virto ĉe tiu batalo. Tamen, fronte al defioj, ni ne miskomprenu pacemon kaj malfortecon de karaktero. Ĉi-rilate, jen la paroloj de **Eleanor L. Doan**: “*Ĉiu malfortulo rajtas laŭdi la Kriston, tamen necesas forta animo por sekvi Lin*”. Ni ne forgesu ankaŭ la ekzemplojn de la unuaj kristanoj, sed ja ni serĉu ĉe ili la travivaĵon, kiun oni devas ripeti en ĉi tiu mondo, nome, la Pacon: “*Kaj la anaro de la kredantoj estis unukora kaj unuanima. (...) Kaj tiel, persekutataj ĉiumaniere, ili ekkomencis vivi komunume. Inter ili neniu havis mankon, ĉar ĉiu helpis unu la alian, kaj estis disdonate al ĉiu laŭ ĉies aparta bezono*”. (La Agoj de la Apostoloj de Jesuo, 4:32 ĝis 34

Paiva Netto

- **Tereza kaj dek moneroj**

Fonto: Medito de Bona Volo prenita el “Sanktaj Spiritualaj Gvidlinioj de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito”, volumo 3, de 1991. | Aktualigita en Majo 2018.

La popolo diras, ke penso estas forto. Ĝi pravas. Iusence, ĝi ripetas tion, kion instruis **Jesuo** en la Evangelio laŭ **Marko**, 9:23 kaj 11:24: “*Ĉio estas ebla por kredanto. Kion ajn vi petos, preĝante, kredis, ke vi tion jam ricevis, kaj vi ĝin havos*”. Memkompreneble, la Dia Instruisto ne aludis al absurdaj petoj, kiujn kelkaj homoj faras kaj poste ili plendas pri nerespondo... Kion ili volas?... Nia Aganta Fido estu ĉiam uzata favore al Bono, kiel en la konstrua ekzemplo de **Sankta Tereza**, kun ŝiaj famaj dek moneroj.

Malba Tahan, kaŝnomo de la fama brazila verkisto kaj matematikisto **Júlio César de Mello e Souza** (1895-1974), rakontas en sia libro *Fabeloj el la Ĉielo kaj el la Tero*, ion, pri kio mi petas vin permeson transkribi ĉi tie laŭmemore, ĉar ĝi estas tre ilustra: “*Sankta Tereza preparis sin por vojaĝo. Unu el la monaĥinoj, kiuj loĝis kun ŝi demandis, kion ŝi faros.*

“— *Mi fondos novan agadon je la servo de Bonfarado — la Sanktulino respondis.*

“— *Kaj ĉu vi havas rimedojn por tio, ĉu vi kunportas iom da mono?*

“— *Dek monerojn.*

Sankta Tereza

“— *Ba, dek monerojn! — la monaĥino ekkriis mire. Tio estas tro malmulte! Kion vi povos fari per dek moneroj, Tereza?*

“— *Jes — respondis la Sanktulino —, vi pravas, efektive. Tereza kaj dek moneroj estas tro malmulte. Tamen, Dio, Tereza kaj dek moneroj estas ĉio*”.

Resume, ĉi tiu estas rakonto de la karmemora profesoro Júlio César de Mello e Souza.

La mondo bezonas bonajn ekzemplojn de laboro, de realigoj, kiuj fine bonfaru al ĝia tuta loĝantaro, **sed urĝe bezonas preĝi**. Tio kaŭzas nenian malbonon, kaj lasas neniun alienita, kiel oni ankoraŭ diras, facilanime. Tio estas kompleta nescio pri esence gravaj aferoj, kiujn oni devas klarigi. Dum la homo almenaŭ parte ne scias, kion li venis fari sur ĉi tiu mondo, li plu stumblados sur la vivovojoj, en ĉi tiu vivo kaj en aliaj dimensioj.

Alziro Zarur (1914-1979), karmemora fondinto de Legio de Bona Volo (LBV), forte rekomendadis: “*La elvokado de la nomo de Dio, kun la koro plena de sincereco, allogas la protekton de Superaj Spiritoj*”. (

Beletraĵoj

- Aforismoj- Proverboj el Uzbekio

Gafur Mirzo

(Traleginte uzbekajn popolajn proverbojn)

Unuecon se vi havas
La pacon vi nepre savas.

El la rondo akorda, hoxora
Ne okazos eskapo lepora.

Por la lago aŝiŝo
Estas ties fiŝo.

Por ĉiu sia moro
Valoras pli ol oro

Sciu: via malsaĝo
Por rival' avantaĝo.

Kiu volas kviete manĝi
Unue pacon devas aranĝi.

Kiu laboras ŝvite
Kun la malsato – kvite!

Se vi senĉese rivalos
Eĉ pompega monto falos.

Kiu maldiligentaĉas
Nur salivon sian maĉas.

Por nenionfarulino
Malfermiĝas diabla sino.

Kredu tio estas vero:
Basflugas pigra pasero.

Pigrulo eĉ por ordoni
Postulas vin ion doni.

Unu kamparano per sia ilo
Kaj lin atendas buŝo de milo.

Ŝajnas, ĉe koruptuloj
Kvar manoj, kvar okuloj.

Nek rikoltis, li nek draŝis,
Sed por manĝi sin ne kaŝis.

Por straba okulo
Ne kulpas spegulo.

Se juvelist' maljustas
Eĉ la oro ekrustas.

Avidulo ne satiĝas,
Avarulo ne fratiĝas.

El mia diraĵo jen, kia senco:
Ŝtelisto pro ŝtelist' estas parenco.

Bonulo kaj bonulo – tio ĉiam konsento
Sed inter du malbonuloj neniam bonsento.

Ĉe kiu por aliul' ekzistas kavo
Povas esti li mem ĝia enhavo.

Se malica homo en bela vesto
Tio ne signifas ke estas festo.

Kokino deklamas
La ovon reklamas.

Ĉu vi volas aŭskulti mian etan kanton?
“Maliculo malamas eĉ sian naskiganton”.

Per la forta voĉo, eĉ kun la ardo
Azeno neniam povas esti bardo.

Malbona ago – okula larmo,
Kaj ĝi ankoraŭ kora alarmo.

Se denunciint' sciis vian agadon
La agado jam komencis vagadon.

Ĉu vi kredas se mi diras tian fakton:
“Provakanta ulo trovis nigran lakton”.

Bona estro – prospero
Sed malbona – malespero.

Konstruiĝis kaj detruigis domo

Kiel strange! Ĉion faris homo.

Nova moviĝas
Kaj malnoviĝas.

Dolĉa vorto – bonkuraco
Ĝi ankoraŭ estas paco.

Kiu pentas
Dion sentas.

Kia aspiro
Tia ja spiro.

Vera, viva amo
Por vivo ornamo.

Lango diras, petas,
Koron interpretas.

Ĉiam kaj ĉie, en ĉiu loko
Estas la sama krio de koko.

Amikon ne perfidu,
Malamikon ne fidu!

Por la homo donaco de milito
Estas eterna dorm' sen dom', sen lito.

Kiam du malsaĝuloj interparolas
La helpon de saĝuloj ili ne volas.

Se vi estas gvidanto
Estu ĉion vidanto.

Kun la saĝulo vi estas saĝa,
Kun stultul' vi estas sovaĝa.

Kiu diras ne gravas
Sed atentu ĉu pravas?!

Se vi estas en saĝa rondo
Via estas la tuta mondo.

Se kapro morton ŝatas

Buĉiston kornobatas.

Unue studu
Kaj poste ludu!

Por poltrono
Mankas trono.

Scienca aro –
Senfunda maro.

La klera kapo – la akra sago,
Malklera kapo – senakva lago.

Scienco estas – en maro flosi
Aŭ per kudrilo la puton fosi.

Lerni bonon – afero nobla,
Ĝin instrui estas duobla.

Ne manĝu, ne trinku kaj estu avara,
Garantios mi riĉon al vi, mia kara.

Sur la grenejo se ekzistas nesto
Por la birdaro ĉiutaga festo.

Havante nenion ne faru fieron,
Riĉrikolta arbo sin klinas teron.

Falĉilo ĉion faris
Sed falĉisto deklaris.

Ne fieriĉu estante debila
Profunda rivero fluas trankvila.

Rememoru proverbon de popolo diritan:
“Botisto ĉiam portas la boton diss[^]iritan”.

Veran riĉon sur tero
Alportas vin tolero.

Foriris tolero
Tuj venis kolero.

Ne knedinte la teston
Ne komencu la feston!

Eĉ en marĉo, de oro
Ne perdiĝas valoro.

Por la ama afero
Ne necesas maklero.

Kun fremdulo leporon ne ĉasu
Se eĉ ĉasas, apud li ne lasu!

Songu por blindulo –
Okulo, nur okulo.

Kato, muso amikiĝis
Grensako maldikiĝis.

Popola sentenco –
Trezo de senco.

Se bovino ne flirtas
La bovo ne malvirtas.

Kie estas ravo
Tie estas “bravo”.

Se kolportist’ ofendas,
Nur vagadas, ne vendas.

Se en vilaĝo ekzistas megero,
Ne necesas hundo sur tiu tero.

Se iu ekstumblis pro sia gapo,
Nu kulpas ŝtono, kulpas ties kapo.

Kata foresto
Por muso festo.

Ĉiun lokon ne revu vi, pensemulo
Ĉiu loke ekzistas sia regulo.

La ŝipo venis
Boato ĝenis.

- Poezioj

Flutura Maĉi



- **Adiaŭ mia Amo!**

La ondo forprenis vian foriron
Mi ne scias al kiuj bordoj forsendis tion
La vento vokis, la vento kriadis
Kaj pli poste ĝi silentis..

La luno aperis kaj mi ĝin spektis
Tra la branĉoj de iu arbo
Mi atendis, mi esperis
ke ĝi diru min ion.

Freneza pluvo ekis
Mi iradis, mi kuradis
Sed nenie ja
Mi vin vidis

Iuloke floroj malfermatis
Aliloke folioj forfaladis
Iuloke pluva valso aŭdiĝis
Kaj kun vi sub pluvo mi dancis

La luno nin observadis
Kelkaj fingroj pianoludis
Mia okuloj viajn okulojn serĉadis
Kison ĝis forgeseco ni interŝanĝis

Estis ja tio Amhistorio
El arta temposezono
Kie la koloroj ludadis
Kie vi la reĝo ja estis.

En la valso de la rozoj
Ĉirkaŭbrakite ni plurestis
Forprenis vualon la ventoj
Sed la fajro ĉi memoraĵon ne bruligis...

- **Per unu krajono**

Per unu krajono
Mi skizis

Per unu krajono
Mi skribis

Per unu krajono
Mi komponis

Per unu krajono
Mi amis

Per unu krajono
Mi naskis bebon
kaj infanon kreskigis

Ĉar mi scipovas la kraĵonon uzi
Ĉar mi scipovas motivojn de la vivo pentri.

- Humoraĵoj

(Turka Stelo 36)

- Sro kuracisto, mi parolas kun mi mem.

Ne zorgu, multaj homoj tiel parolas al si mem.

Sed sro kuracisto, mi jam enuis paroli kun tiu stultulo!

* * *

- Mi aŭdis ke vi edziĝis.

Jes.

Gratulojn! Ĉu vi estas feliĉa?

Mia edzino diras: jes...

* * *

Du amikoj.

Ĉu vi edziĝas kun via koramikino?

Ne, ŝi diris ke mi estas malriĉulo.

Sed vi havas riĉan onklon, kial vi ne diris tion al ŝi?

Ha! mi diris tion, kaj nun ŝi estas mia onklino...

(Hungaraj)

Organgreftado

– Doktoro, kion vi povas diri pri la stato de la organoj: miaj koro, hepato, renoj?

– Ne zorgu pri ili! Organkomercistoj jam ne havas iun ajn intereson pri ili.

Demandas viro al rabeno:

- Mi volas vivi eterne, kion mi faru?

Respondas la rabeno:

- Edziĝu!

- Ĉu tiam mi vivos eterne?

- Ne, sed la deziro malaperos.

Artefarita fekundigo

Veterinaro vizitas stalon de bovinoj por artefarite fekundigi ilin. Post kiam li finis sian laboron, kaj li estas forironta, iu bovino demandas lin:

– Ĉu eĉ unusolan aman kiseton vi ne donas al mi post nia geumado?

- Ĵan (Jean), tre malvarma estas en tiu loĝejo. Kiom da gradoj estas ene?

- Dekses gradoj, sinjoro.

- Kaj ekstere?

- Kvin gradoj, sinjoro.

- Malfermu la fenestron, ke envenu ankoraŭ la kvin gradoj!

Psikologo

Eniras la psikologo tute malplenan, senhoman ĉambron kaj poste diras:

- Diru, sinjoro, de kiam vi imagas, se vi estas nevidebla?

(El Turka Stelo)

- Sinjoro doktoro, mi ne scias, kion fari, miaj piedoj ĉiutage pli kaj pli nigriĝas! Ĉu mi baldaŭ mortos?!

- Ĉu vi lavas viajn piedojn?

* * *

Monpuno estas imposto pro la neleĝaj faroj.

Imposto estas monpuno pro la leĝa faroj.

* * *

Edzo revenas frustanta hejmen. Sidas ĉe la tablo, manĝas, ne parolas kun sia edzino. Ŝi ne scias kiel komuniki al li la bonan novaĵon, fine, ŝi decidas kaj diras:

- Kara, mi estas graveda!

Edzo ĵetas la kuleron:

- Ĉu vi ankaŭ?!!

* * *

En lernejo la instruistino diras al la gelernantoj:

— Diru al mi kvin bestojn, kiuj vivas en la Norda arkto!

Peĉjo anoncas sin:

— Unu foko kaj kvar blankaj ursoj.

Du amikinoj.

- Karulino, kiom vi pezas?

- 120 kilogramojn kun okulvitroj.

- Sed kiom vi pezas sen okulvitroj?
- Sen okulvitroj mi ne vidas pesilon.

- Bokso estas la plej interesa, bela kaj alloga sporto!
- Verŝane vi estas boksisto?!
- Oh, ne, mi estas dentisto

Serioza problemo:

- Kiel plialtigi la nivelon de novaj kuracistoj?

Propono:

- Ili dum la unuaj tri jaroj kuracu siajn instruistojn!

Miraklo

Handikapulo eniris preĝejon. Li haltis ĉe la sanktakvujo, ĉerpis akvon el ĝi kaj akvumis ambaŭ kruojn. Tiam li tuj disĵetis siajn lambastonojn. Iu knabeto vidis, kio okazis, li kuregis al la pastro. La pastro diris al li:

– Mia filo, vi ĝuste nun atestis miraklon. Diru al mi, kie li estas nun?

– Li kuŝas apud la sanktakvujo sur la planko.

En la kinejo

Subita virina krio en malluma kinejo:

- Hej, vi, tuj forprenu vian manon de mia genuo! Ne, ne vi, vi!

Eterna sekreto

- Paĉjo, kio la sekreto de la feliĉa geedzeco?
- Vere, mia filo, tio restas eterna sekreto.

- Taglibro
2018. NOVEMBRA LETERO

ĈIUJ MIAJ KARAJ GEAMIKOJ!!

NOV. 13.

Filippon ni hejmen portis kun Rita el la hospitalo.

Li estis ege feliĉa, ke denove li estas hejme.

Mi rememoras la malnovan familian proverbon: “ĈIE ESTAS BONE, SED PLEJ BONE ESTAS EN MIA PROPRA LITO!”

Posttagmeze vizitis nin Antonella kaj Gigi.

NOV. 14.

Hodiaŭ venis nia nova helpanto: CARLOALBERTO. Mi iris kun li aĉetadi.

Antaŭtagmeze vizitis Filippon Rita.

Posttagmeze venis Milena kun sia patrino, Erminia, kun kiu li longe diskutis. Ili ŝanĝis siajn spertojn. Poste venis Eugenio.

Post ilia foriro alvenis Chiara. Filippo diktis al Chiara la tradukon de la fabelo, kiun li komencis en la hospitalo.

Hodiaŭ Filippo manĝis sufiĉe bone kaj tagmeze kaj vespere, sed bedaŭrinde vespere je la 22. horo li vomis ĉion. Li estas malforta.

La oktobran leteron mi ankori ne sendis al vi. Pardonu min.

NOVEMBRAJ TAGOJ

Nun mi lernas, kion signifas la resaniĝo! Ĉiutage iometetete pli bone farti.

La vetero malvarmiĝis, pro tio mi penadas matene kiel eble plej frue hejti.

Cetere, ankaŭ mi ripozas multe, kaj mi laboras absolute nur tiom, kiom mi nepre devas.

INTERVJUO

Du amikoj (Stefano kaj Ale) faris intervjuon kun ni. La demandojn antaŭe skribis Filippo. Ale demandis kaj Filippo respondis en itala, mi en Esperanto, kion poste Filippo devos traduki al itala lingvo. Stefano lerte uzis la filmaparaton.

Precipe pri Esperanto kaj pri niaj libroj ni rakontis. Mi scivolemas pri la rezulto!

Ni ambaŭ iomete laciĝis!

FARKAS-TATAR ÉVA (1924 – 2018)

La 23-an de novembro 2018, posttagmeze, trankvile endormiĝis eterne, mia tre amata kaj estimata amikino: ÉVA. Ripozu en paco!

Neanstataŭigebla perdo en la mondo de esperantistoj. Sincere mi ĝojas, ke ŝi ricevis la DEGUĈI-PREMION en 2015! Ŝi ververe meritis ĝin!

Kara mia Amikino! **Neniam mi forgesos Cin!**

PENSIOJ EN EŬROPO

Nekomprenebla kaj neakceptebla estas la fakto, ke en Albanio la averaĝa pensio estas 55 eŭroj, en Luksemburgo estas 3.000 eŭroj.

Ĝenerale en Orienteŭropo la vivnivelo estas multe pli malalta ol en Okcidenteŭropo.

Kiu kulpas pro tio? Aŭ kiuj kulpas??? Kaj poste ni miras, ke la junularo formigras. Enea afero estas la malriĉeco! La anima riĉeco nur por malmultaj homoj valoras!!!

Mi rememoras belegan poemon de Sándor Reményik. (Pardonu pro ne tro bona traduko mia!)

NIAJN ĈIUTAGAJN ROZOJN

Ĉi tiel Ci preĝas:

Niajn ĉiutagajn rozojn

Donu al ni hodiaŭ.

Donu, ke apud pano ankaŭ rozo estu.
Kaj donu, Dio mia, ke ni vivu en paco
Per pli multe da rozo kaj malpli multe da pano.
Ĉi tiel Ci preĝas:
Silente Ci interpolas la *Patronian*.
Kaj Jesuo, la poeto de la *Patronia*,
Milde rigardas la rozkoloran preĝon.
Kaj li akceptas cian interpolaĵon.

MALGRANDA ESTAS LA MONDO

Jam de multaj jaroj, ĉiusemajne ni aĉetas la gazeton “SETTIMANA ENIGMISTICA! Kaj ni partoprenas la konkurson. Foje Filippo, foje mi sukcesas solvi la konkursan enigmon. Antaŭ jaroj ni gajnis plurcent paĝan Enciklopedion. Nun ni gajnis centrifugon Princess. Jam tri foje la ŝoforoj alportis la centrifugon, sed ili ne trovis nian adreson. Filippo skribis leteron kaj detale priskribis, kie ni loĝas. Poste ni ricevis leteron de iu Erika, ke nia adreso estas netrovebla. Mi telefonis denove al ŝi, poste ŝi retelefonis kaj diris, ke espereble nun, finfine, ni ricevos la gajnaĵon. Kaj ververe, la belega centrifugo alvenis! Vespere mi ricevis hungarlingvan leteron de Erika. Evidentiĝis, ke ankaŭ ŝi estas hungarino! Grandega estis mia ĝojo! Tuj mi rakontis al Filippo, kiu ne nur kun-ĝojis, sed tuj proponis, ke mi nepre invitu al ni la novan hungaran amikinojn!
Kelkfoje okazas, ke aperas neatendita ĝojo en nia vivo! Dankon!

NOV.27.

Dum mi estis en Vigolzone por la sangoanalizo kun Carloalberto, Filippo razis sin kaj tiel plijuniĝis dek jarojn! Poste ni iris per Ruĝkruca aŭtomobilo al Piacenza hospitalo, kie ni trovis Daniela, perfektan infirmierinojn, ĉar ŝi sukcesis preskaŭ sendoloro ŝanĝi la kateteron al Filippo. La 3-an de januaro 2019 ni devos iri sekvontfoje. Ni pagis por la vojaĝo per aŭtomobilo 40 eŭrojn. Ni ambaŭ laciĝis.

Filippo iomete fartas pli bone. Mia amikino Rita, korespondas kun mi en rumana lingvo, per la helpo de la komputila tradukilo. Ŝi nun multe laboras kaj ŝi ne povis viziti nin. Do, ŝi korespondas!

Mi respondas en rumana lingvo, kiun ŝi tradukas al itala!

TORPORAS LA ETRINGRO DE LA MALDEKSTRA MANO

Mi rigardis, kion ĝi signifas. Nu... mi ne priskribos ĝin!

MI ATENDAS LA 21-AN DE DECEMBRO

Ja komence de tiu tago (naskiĝtago de Stalin!), plilongiĝas la tagoj: **POST TENEBRUM LŬ!**

Multajn helbrilajn tagojn mi deziras al Vi ĉiuj!

- 2018 DECEMBRA LETERO

FILIPPO Je mia granda ĝojo, Filippo resaniĝas – eĉ se malrapide! Ĉiutage iomete li plifortas. Mi dankas al Bonadio! Kaj al vi ĉiuj, kiuj konstante pensas pri ni!

LA TEORIO DE GRAFO-FRAŬLINO

Post la hejmenveno de la rifuĝo en 1945 Budapeŝto, danke al bonkoraj profesorinoj, ni “finis” la IV. klason de la gimnazio, ke ni ne perdu unu jaron ĉe la lernejo, en Kluĵa Reformita Knabina Liceo.

Dum somero ni vivis en vilaĝeto, Ferencbánya, kie mia Dolĉapatro ricevis laborlokon, kiel librotenisto, ĉe la karbonminejo de Egeres, proksime de Kluĵo.

Ĉiutage mi iris al la najbara vilaĝo, por hejmenporti 2 l. da freŝa lakto. Hejme ni devis ĝin boli, poste porti ĝin al la kelo. Ja tiutempe ni eĉ ne aŭdis pri la ekzisto de la fridkesto. Ne estis facila tasko por mi, ke eĉ guto da lakto ne falu teren el la plenplena kaserolo.

La itinero: de la kuirejo al la koridoro, poste al la verando, kie mi devis malfermi la pendolantan pordeton, atente, ke la kokinoj de la korto ne eniru, rigli ĝin, malsupreniri kvar stupojn, oblikve trairi la birdkorton, malfermi kaj fermi la pordeton al la ĝardeno, ankaŭ tie atenti pri la kokinoj kaj pri la kolerema ruĝa koko, poste nur promeni je la ĝardeno, ĉirkaŭ 20 paŝan pasejon ĝis la kelo pordo, kiu bonŝance ĉiam estis malfermita. En la kelo estis aparta loko sur la breto por la lakta kaserolo. Granda kovrilo troviĝis tie, por nepre kovri la kaserolon, ja katoj kaj sciuroj povintus eniri en la kelon. Dum tiuj kelkaj minutoj la kaserolo plipeziĝis, do, mi iomete laciĝis. Sincere mi devas konfesi, ke la ĉiutaga laboreto estis tre enuiga kaj laciga por mi.

Mia fantazio helpis min plifaciligi la aferon, ĉar mi inventis la teorion de la *grafo-fraŭlino*, nome, mi imagis, ke mi estas sorĉita grafo-fraŭlino, kiun oni devigas fari malindan laboron. Tiel ĉiutage mi ludis la rolon de la kompatinda, ensorĉita grafo-fraŭlino kaj la mortenuiga kaj laciga laboreto plifaciliĝis. Eĉ post multaj jaroj okazis, ke se iu farindaĵo ŝajnis al mi malfacila aŭ enuiga, miaj gepatroj tuj memorigis min pri mia “famiĝinta teorio” kaj ili diris al mi: “Uzu cian teorion de grafo-fraŭlino!” Kaj ververe, ofte ĝi helpis min. Pasis jam jardekoj, sed subkonscie eĉ nun, kelkfoje, tiu “teorio” donas al mi forton, plenumi la pli malfacile plenumendajn taskojn! Kaj “ĉerizo sur la torto”, ke dumtempe eĉ rideti mi povas.

Akceptu de mi ĉi tiun teorion, kiel etan kristnaskfestran donaceton!

FORLASITECO

Senprotekteco aŭ sendefendeco.

Hodiaŭ estas sabato. Rozi, la pagata helpantino, telefonis, ke ŝi hodiaŭ ne povas veni.

Carloalberto ĉi semajne jam dufoje helpis, do, honteme mi demandis lin, ĉu li povus veni ankaŭ hodiaŭ, sed bedaŭrinde, li ne povas veni, nur lunde. Milena forvojaĝis por tri tagoj al la maro. Rita ankoraŭ ne resaniĝis. La komputilo malboniĝis. Nia amiko Peppino, la ĉefhelpanto de la komputilo, havis operacion ĉe genuo, eble Ĉinzia, la edzino venos kaj portos hejmen al li, kie Peppino povus ripari ĝin. Ĝiampiero hieraŭ estis ĉe ni. Chiara promesis veni, sed eble ŝi forgesis kaj ne venis. Eugenio+Eleonora kutime dimanĉe venas.

Subite aperis nia Savanĝelo, Antonella. Kun ŝi mi iris al Ponte kaj aĉetadis.

Intertempe Elio, malnova amiko, vizitis Filippon, ĉijare la unuan fojon.

Turmentas nin ambaŭ la reŭmatismo. Kaj Filippo kaj mi suferegas.

Ververe, ne estas facile esti maljuna! Bonŝance ĝi ne estas eterna!

(Ĉu ĉi tiu nomiĝas “pendigil-humuro”?!)

ETA JULIA

Mia amikino, Kicsivera (etavera), mortis antaŭ kelkaj jaroj. Espereble, en la ĉielo ankaŭ ŝi ĝojas nun, ke naskiĝis ŝia dua nepino. Post Panni, ankaŭ la dua nepino estas. Ŝia nomo: Julia.

HELIKON

Mia karega bofratino Erika, sendis al mi la lastajn numerojn de HELIKON. FELIĈO! Kiel soifanto en Saharo, mi legas ĉiujn literojn de la hungara literatura gazeto kaj mi mirege ĝuas la multajn valorajn verkojn.

Foje estas ankaŭ grandaj ĝojoj en la vivo!

LONGVIVAJ HOMOJ

Multajn interesajn aferojn mi eksciis el la libro “MIRU! PENSU! RIDU” de Paul Bennemann. La libro aperis en 1950. Kelkajn nomojn mi kopias de personoj longvivaj:

100 jarojn vivis Ramses, la egipta faraono, Fontenelle, la franca verkisto.

99: Tizian, 97: la doĝo Dandolo, 96: Gregoro IX-a, 93: Leo XIII-a, 92: Radetzki, 91: Thomas a Kempis, 90: Pitagoro, 89 Michelangelo, 86: Hindenburg, Metternich, 85: Cato, 84: Edison, Newton,

83: Bismarck Victor Hugo, Voltaire, 82: Goethe, Tennyson, 81: Morse, 80: Buddha, Chateaubriand, Kant, Platono, ktp

GINKGO BILOBA

La plej bela arbo de nia ĝardeno, kiun plantis Filippo antaŭ jardekoj! Nun mi eksciis el la menciita libro de Bennemann, ke ĝi “estas la sola organismo, kiu ekde la ŝtonkarba tempo restis vivanta ĝis nun. Ĝi estas botanike interesa kiel hibrida formo inter fanerogamoj kaj kriptogamoj.”

STRANGA TAGO

La 11.12. Filippo konstatis, ke la katetero ne funkcias. Li vokis la ambulancan aŭtomobilon kaj en Piacenza urologo ŝanĝis la kateteron. Per alia ambulanca veturilo ni hejmen venis. Ni ambaŭ

tre laciĝis, sed dum kvar horoj la problemo estis solvita. Poste, dum la tuta tago ni ripozis kaj dormetis.

ESTAS TAGOJ

Neniu vizitas nin. Neniu telefonas. La komputilo estas for. Izolite de la mondo ni estas.

Mi rememoras iun poeton, kiu skribis en poemo: “DIO MIA! BONVOLU TELEFONI!”

PELET

Ĝi estas la nomo de la materio, per kio ni hejtas per la nova forno en la kuirejo. Ĉiutage ni bezonas du 10 kg. sakojn. Jam nur por unu semajno sufiĉas, kiom ni havas. Ni tre esperas, ke oni alportos la menditajn novajn sakojn. Ankaŭ ĉi tie neĝis, matene je la 6. horo 0 grado estis!

18. decembro. Oni alportis 96 sakojn, kostis 375 eŭroj.

21. decembro. Eugenio kun la du filoj (Giacomo 20, Dario 13 j.) dum duonhoro enportis la 96 sakojn en la lignejon! Eŭgenio vera, helpema amiko estas!!!

NOVA ADRESO

Peppino plibonigis, riparis la komputilon. Nur Google ne funkcias. Mi devis fari novan adreson.

Mian novan retadreson faris Peppino.

ATENTON!!!

julia.sigmond.j@gmail.com

FELIĈECAN KRISTNASKON KAJ PACOPLĜENAN NOVAN JARON! JULIA

- Rakonto

Virino ankoraŭ juneca, blondiĝinta pro zorgoj, kvindeksepjara rakontas:

"Kiam mi fariĝis pensiulino, mi havis la senton, ke malfermiĝis antaŭ mi la mondo. Mi ne havis hundon, nek katon, mi devis nur pri mi okupiĝi. Mi realigis la du grandajn dezirojn de mia vivo: aĉetis ruĝan ĉapelon kaj ellernis skiadi. La ruĝan ĉapelon poste mi metis en la fundon de la ŝranko, ĉar amikinoj komencis karesnemi min „trompludistino”, nome ke mi metas ruĝon sur karoon, sed la skiado iom post iom fariĝis por mi pasio.

Mi komencis sur la pli plataj deklivoj de Normafa. Komence mia trejnisto ne atendis multon de mi, li proponis, ke mi faru kelkajn fortajn trejnojajn kaj rezignu, sed mi persistis, kuraĝis ekiri al pli kaj pli krutajn deklivojn. Fine pasintjare mi decidis, ke mi iros en Austrion kaj faros provon sur la grandaj alpaj skiejoj. Mi pagis por naŭtaga restado en Tirol, kaj aĉetis duamane (uzitan)

admirindan bluan skikostumon (overalon) unupecan kun multaj poŝoj, multaj zipoj, remburita ĉe la genuoj, faldumita ĉe maleoloj, unuvorte ĝi estis belega peco. Kaj vespere – ja mi ne deziris tro multajn vidajn atestantojn, mi staris en la Tubenthala skiejo. Dio mia, mi, Valéria Kovács el la strato Népszínház, malantaŭa korto, helika ŝtuparo, profunde spiris kaj ekiris. Komence ĉio iris glate. Antaŭ la granda krutaĵo mi ekhaltis en etan ripozlokon por anheli. Sed mi bezonis ne nur anheli, sed ankaŭ alion fari, eble mi frostetis sube, ĉar la afero ŝajnis tre urĝa. Jam mi ne povis reiri al la gastejo, mi ĉirkaŭrigardis, vidis neniun, kaŭriĝis. Estis nur unu problemo, ke mian belegan skivestaĵon ne eblis dividi, mi povis demeti nur la tuton, tirante la puloveron ĝis la kolo. Tiamaniere, ekde la ŝultroj ĝis la maleoloj mi montriĝis en plena mia natura beleco.

Unuvorte, mi kaŭriĝis, la afero estis ĝuste en kontinueco, kiam mi konstatis kun la plej granda konsterniĝo, ke la skioj ekglitis de sub mi – ŝajne mi faris malbone la plugilo – pozicion.

Komence mi nur malrapide glitetis, poste mi ekrapidis kaj kun timiga rapideco galopis malsupren sur la kruta deklivo. Se mi ne volis rompi mian kolon, mi devis ekstarti en la pozicion konforman al la reguloj, kun pulovero ĉe la kolo, kalsoneto kaj skivesto ĉe maleoloj. Kion mi diru, mi jam estis eĉ pli feliĉa Senĉese mi ripetadis enpense:

Dio mia, se post tio mi plu vivos, donacos mil forintojn por la konstruado de la nova Nacia Teatro.

Fine mi direktis min al arbusto, ĝi jam ne povis devojiĝi, mia artiklo deartikiĝis, sed per mia sendifekta mano mi povis retiri mian kalsoneton. La montaraj savantoj alvenis kaj akompanis min al la ambulanco.

Sur leda kanapo sidis maljuna viro kun provizora bandaĝo sur la rompita kruro. Per la ruinoj de liaj skioj ĝuste tiam oni bruligis fajron en la forno. Atendante la kuraciston, ni komencis babiladi."

"Ĉu ankaŭ vi estas komencanto, sinjoro?"

"Ĉu mi, sinjorino? Mi skiadas de kvardek jaroj, mi estas plurfoja ĉampiono de Malsupra Austrio kaj nun mi vundiĝis la unuan fojon."

" Kio okazis?"

"Tio estis la infero mem, sinjorino. Mi glitas malsupren sur la skivojo en mia trankvila ritmo, kiam de malantaŭ ekaperas sorĉistino kun pulovero ĉe kolo, la skikostumo ĉe maleoloj, alie tute senvesta, eĉ la loko de ŝia cekuma operacio videblis, por ne paroli pri alio. Krieganta, kun plena rapideco galopis preter mi.

Mi konsterniĝis tiomgrade, ke mi alpuŝiĝis al arbo. Sed mi renkontu nur tiun sorĉistinon! Ĉu ankaŭ vi estas ŝia viktimo, sinjorino?"

"Ankaŭ mi – mi diras, kaj mi pripensadis, kun kiom da elpreno oni redonus al mi la prezon de la oktaga feriado."

(verkis **György Moldova 1934**) el Hungario
tradukis kaj sendis **Lenke Szász**, el Rumanio

(ĉerpita el Turka Stelo nr 37)

Vojaĝoj


- Vizito de s-ro Sogilsu al Ĉinio kaj Pakistano











塔吉克婚礼 Tajik wedding




- Albanaj naciaj kostumoj





































•



•
•



•
•





